

Lajos Tarkony



STAFETO



Beletraj Kajeroj



WILLIAM AULD

Unufingraj
melodioj



Edwin de Kock

Edwin de Kock naskiĝis en Sud-Afriko en 1930, lernis Esperanton en 1955 kaj debatis en *Esperanta Antologio*, 1958, kaj per *Ombroj de la Kvara Dimensio*, 1961, diverse tempe studis teologion, parolarton kaj lingvojn kun ties literataro; nun instruas precipe la anglan kaj la afrikansan. Li tre fidus je la originala beletra por elpolarigi kaj akceptigi Esperanton




arcoj

gerald
mattos



BELETRAJ KAJEROJ

Poemaro
kaj
Prozaroj



Edwin de Kock

HUNGARA VIVO

3

1974

8,- Ft

ÜGP | MALPEZA VANDO PANELO

La panelo ÜGP estas etaĝon alta, interna vando-
elemento de 6-centimetra dikeco, kies esenca
materio estas gips-perlito.



La muntado de vando el ÜGP-panelo estas simpla,
rapida, tre produktiva, la konstruada malsekeco
estas malpliigebla je minimumo.



Panelo ÜGP estas fabrikata de Heves megyei
Tanácsi Építőipari Vállalat (Konsilantara Konstru-
entrepreno de departemento Heves)



H-3301 Eger, Klapka Gy. u. 11. Pf. 7.

**Numero pri la originala
Esperanto — poezio**

ENHAVO

V. Benczik: Kien la poezio?	1
D-ro W. A. Verloren van The- maat: Ĉu vivas nia liriko?	2
William Auld: Skizo pri la evo- luto de la poezia lingvaĵo?	3
Poemoj de Kálmán Kalocsay, Baldur Ragnarsson kaj Victor Sadler	8
Lajos Tárkony: Kvar sezonoj en 1919	9
J. Régulo Pérez: Poezio kaj el- donisto	10
V. Benczik: Esperanta liriko en Hungarlando	12
Reto Rossetti: Aŭtoritatulo	12
Poemoj de Miyamoto Masao, Re- zsó Rajczi kaj Geraldo Mattos	13
V. Benczik: Nova rikolto	14
Gábor Vigh: Penso-eroj pri Es- peranta liriko	16
Poemoj	17
Panoramo	18
Diplomatoj de la hungara kulturo kaj scienco	20
A. Pechan: Hungaraj orkestroj en Ameriko	21
Lajos Tárkony: Revuo de revuoj	24
A. Kristóf: Sciencfikcia situacio	26
Korespondi deziras	28
25-a Hungarlanda Esperanto- Kongreso	28
P. Balkányi: Sur la spuroj de genia esploristo	29
Afrikanaj kaj Aziaj junuloj en la Hungara Sporta Altlernejo (trad. Tibor Újlaky-Nagy)	30
Krucvortenigmo	31
Humuro	32
Sur la titolpaĝo: foto de Zoltán Fejér.	

Kien la poezio?

Antaŭ ĉ. dudek jaroj Brendon Clark donis la saman titolon al sia multe diskutita libro pri la esperanta poetiko. Neniel ni volas ĉi tie pritrakti tiun finfine flankan temon: laŭ nia opinio la estonto de nia poezio dependas en la nuna tempo de faktoroj unuavice sociaj, t. e. movadaj.

Kiam ni surpaperigas tiujn ĉi liniojn, ankoraŭ mankas eĥoj pri nia ĉijara unua numero, kiu pritraktis la originalan esperantan prozon. Ni pensis fari ion tute novan en la historio de nia kritiko kaj literatur-popularigo: laŭvice trapasi ĉiujn tri ĝenrogrupojn — prozon, poezion kaj dramon — kun la celo fari la bilancon de la ĝisnunaj atingoj, serĉi la plej ĝustajn vojojn de la estonto, kaj ankaŭ alvoki la atenton de la publiko pri la originala literaturo, kiu ĝis nun certe estas unu el la ĉefaj atutoj de la Internacia Lingvo.

Tiu ĉi numero estas dediĉita al la originala poezio. Estas nekon-
testeble, ke tiu ĉi branĉo kreskigis la plej ravajn florojn de nia literaturo: ne malmultaj el niaj poetoj estus akceptataj volonte ankaŭ en renomaj literaturoj, eĉ, kelkaj el ili verkas nacilingve kun ne malmulta sukceso. Tio implicas, ke alvenis la tempo prezenti nian poezion ankaŭ nacilingve. En kelkaj landoj tio jam daŭras, kaj sendube ĝi estas la plej trafa pruvo pri la kulturaj valoroj de E-o.

La „ora libro” de nia poezio, la *Esperanta Antologio* difinas tri periodojn en la historio de la originala poezio: *primitiva romantismo*, *polurita romantismo* kaj *metafiziko*. Multaj pridiskutis la pravecon de tiuj etiketoj, sed neniuj ĝis nun kontestis, ke tiuj tri periodoj vere ekzistis. El tio nature sekvas, ke tiu poezio, kiu antaŭ okdek-sep jaroj kun la poemoj *Ho, mia kor’!* kaj *Mia penso* de Zamenhof kreigis preskaŭ el nenio, ĝis nun trapasis minimume tri gravajn evolugradojn kaj fariĝis pli-malpli sinkrona kun la nacilingvaj.

Tamen, ni ne povas esti kontentaj, se temas pri la legateco de la originala poezio. La densiĝo, komplikiĝo de la poezia lingvaĵo kaj esprimmaniero malfaciligis ĝian legadon. Por legi la kremon de nia originala poezio — precipe de la nuntempa — krom perfekta lingvoscio necesas ankaŭ relative altgrada edukiteco, kaj tiu fakto ege malgrandigas la nombron de la poeziamantoj. Tamen, reiro al iaspeca „simplismo” certe signifus ankaŭ artan regreson. Kion do fari? La solvo ne estas facila, sed ni ĉerpu iom da konsolo el tio, ke ankaŭ la nacilingvaj poezioj luktas kun la sama dilemo.

Se ne perfekta solvo, almenaŭ plibonigo de la situacio tamen estas ebla. Kaj ankaŭ ĉi tie temas pri la respondeco de la gazetaro, kiu momente estas la plej grava faktoro en nia kultura vivo. Kvankam koncerne la kvanton de la aperantaj poemoj oni ne povas plendi, la kvalito ege postrestas al la nivelo, establiginta en nia literaturo. La gazetaro — anstataŭ prezenti la plataĵojn de la lokaj „poetoj” — devus strebi por la popularigo de la kremo de nia poezio, foje-foje publikigante poemojn de elstaraj originalaj poetoj kun lingvaj kaj prienhavaj komentoj, kiuj faciligas la komprenon. Io tia necesus ankaŭ en daŭrigaj kaj superaj kursoj. Alia, sed samcela tasko estas variigi la literaturan programon de la esperantistaj festoj. Oni aŭdas ĉiam nur la samajn poemojn de Zamenhof, Grabowski kaj eventuale de Baghy. Ĉu la grupestroj konas, ne pli ol tri esp-istajn poetojn?

Dum la lastaj dudek jaroj nia poezio faris gravan antaŭpaŝon. La kvindekajn jarojn kronis la apero de la skota skolo, Boulton kaj Ragnarsson, la sesdekaj jaroj regalis nin per la poezio de Edwin de Kock, Sadler kaj laste de Miyamoto. Kion la estonto alportos? Tio unuavice dependas de la movado. Talentajn poetojn ni havas, do la subjektivaj antaŭkondiĉoj de la plua evoluo estas certigitaj. Necesas nur iom pli intensa interesiĝo flanke de la esperantistoj. Ni esperu, ke ankaŭ la sekvaj paĝoj de tiu ĉi numero de nia revuo povos iom kontribui por tio.

V. B.

Ĉu vivas nia liriko?

Bedaŭrinde, mi ne sukcesis ekscii, kaj nun mi suferas pro la du-boj... Ĉu vivas... ĉu ne?... Sed ni lasu la ŝercon. Por tiu ĉi numero de Hungara Vivo la Redakcio planis fari grandskalan enketon inter la poetoj, kritikistoj, movadaj gvidantoj de Esperantujo. Ni dissendis dudekon la leteroj al personoj, kiuj laŭ sia agado ŝajnas forte ligitaj al Esperanto, kaj ni petis ilin surpaperigi siajn pensojn pri tiu demando. Unuavice nin interesis, kion ili pensas pri la socia valoro, efikeco de nia poezio — unuvorte: kiom ĝi estas legata. Por kiom da homoj la originala esperanta poezio reprezentas efektivan kulturalan fonton, el kiu ili de tempo al tempo ĉerpas inspiron. Ĉion ĉi tre detale ni eksplikis en la dissenditaj leteroj. Bedaŭrinde, la rezulto estis ne tia, kian ni esperis. La plimulto de la adresitoj — inter ili pluraj gvidantoj de la internacia movado — tute ne reagis, kaj eĉ la respondintoj ne ĉiuj prenis serioza nian peton... Do, anstataŭ doni reprezentan opiniaron pri nia poezio, ni povas prezenti nur simpton de danĝera malsano, de la indiferento. Ĉisube ni publikigas la ricevitajn respondojn, kiuj — kvankam la Redakcio ne povas identigi sin kun la opinioj, esprimitaj en ili — lanĉas interesajn pensojn.

V. Benczik

Certe ŝajnas al mi, ke nia poezio vivas kaj estas legata. Mi povas paroli nur laŭ propra sperto; sed kien ajn mi vojaĝas en la mondo mi renkontas samideanojn, kiuj tre klare evidencigas perfektan scion pri miaj poemoj — kaj ne nur miaj, sed ankaŭ pri nia poezio ĝenerale. Ĉe miaj universitataj kursoj pri Esperanto en Kalifornio la superkursaj studentoj vere tre informite diskutas kaj debatas pri la poezio de Esperanto; kaj similan fenomenon mi trovis en Japanujo pasintjare. Plej trafas min la konstato, ke granda proporcio de tiuj legantoj estas progresemaj junuloj; multaj el ili studis en izolo, malproksime de aliaj esperantistoj, kaj kelkaj diris al mi, ke ili ĉerpis grandan inspiron por siaj idealoj kaj ideologio el la legado de (interalie) miaj verkoj. Tio evidente tre kuraĝigas min kiel poeton: neniu volas verki en vakuo, tute precipe kiam oni estas socie konscia persono. Efektive, en la nuna stadio de nia afero, neniu volus verki poemojn, se ne troviĝus legantoj; la tagoj de narcisisma sintavartado jam delonge forpasis. Laŭ mia opinio, ankaŭ la poetoj — nome la elstaraj talentoj — de Esperanto ludas gravan socian rolon.

William Auld

Se per tiu ĉi demando oni celus la legatecon de niaj verslibroj, mi emus respondi, ke en la nuna tempo nia poezio estas preskaŭ mortinta. Kiel jam ofte plendis la honorplena eldonisto de STAFETO, kaj ankaŭ mi persone spertis post la propra aperigo de du poemaroj, ekzistas en Esperantio apenaŭ pli da legantoj ol versfaremuloj. Por tiu mizera situacio — kiu min progresse forklinigadas al laboro sur nacilingva kampo — troviĝas specifaj kialoj. Mi mencias nur la jenon.

Ni bagateligas nian originalan versarton per troa emfazo de sensignifaj poemtradukoj. Ĝenerale la rezultoj de tiu teda industrio estas kvalite substandarda. Kial oni ne volas agnoski la simplan fakton, bone konatan en nacilingvaj rondoj, ke poezian literaturon vere altgradan oni ne povas grandskale alproprigi al si laŭ tiu maniero, sed devas — lante kaj lacige — krei el la propra genio, se tio ekzistas efektive? Poemo estas, interalie, unika sona kaj ritma manifestiĝo de specifa lingvo kaj tial principe ne tradukebla. Nur tre esceptokaze eblas vere bona rekreado, eble dekfoje dum la vivo de la ricevanta literaturo. Bri-la ekzemplo — laŭ mi sen kvalita paralelo inter ĉiuj tradukpoemoj en Esperanto — estas tiu libera reverkaĵo de Edward Fitzgerald, la angla „Rubaiyat of Omar Khayyam of Nishapur”. Centoj da vanaj kaj miscelaj provoj ripeti lian sukceson en aliaj lingvoj klare pruvas, ke temas pri rara speco de birdo kiu ne ofte flugas tra la beletra ĉielo. Por pli precizigi mian pretenon, mi donas ekzemplon de tre pretenda, ekscese laŭdata sed poezie ne multe valora verko kiu akumulas polvon sur miaj librobretoloj, nome La Floroj de l' Malbono. Hazarde mi devis zorge trastudadi la tutan, grandiozan originalon de Charles Baudelaire, kaj mi komparis! Se tiel statas ĉe unu el la plej ambiciaj tradukoj en nia lingvo, kion oni diru pri la tre granda abundo da malpliaĵoj troplenigantaj la merkaton?

Ni vere ne devus miri aŭ lamenti kiam poeziamantoj rifuzas malparisian tempon legi tiaĵojn. Sed bedaŭrinde ili emas apliki la saman malfavoron ankaŭ al nia poezio originala. Ili ja observis la ekscesaĵojn kaj idiotajn, por ne diri amatorajn, laŭdojn al ĝuste la tradukoj kiujn ili trovis plene neĝueblaj; ĉar ĉu oni ne

asertas aŭ almenaŭ implicas ties superecon kompare kun la originalaj poemoj? En tute komprenebla malfido, tiuj poeziamantoj do simple forturniĝas ankaŭ de ĉi-lastaj verkoj, eĉ ne leginte ilin. Krome ni konfesus, ke la tradukisma manio en certaj kazoj havis tre malbonan influon sur nia originala verkado. Tro multaj el niaj propre Esperantaj poemoj aspektas same kunŝraŭbitaj kaj senvivaj metrikaĵoj, kiel la tedaj eroj translingvigitaj el la angla, la franca, aŭ la hungara. Tiurilate tre malbonis la sinteno kaj influo de Kalocsay, por kiu — laŭ intervjuo iam aperinta en Norda Prismo — Esperanto estis nur „nobla hobia”!

Parte kiel rezulto de tio, niaj poetoj ne sufiĉe strebas plene ekspluati la mirindajn latentojn de Esperanto, sendube jam sufiĉe matura por aŭtonomiĝi ankaŭ literature. Cetere, lingvo sen propra kulturo aŭ unika beleto estas anomalio en la mondo kaj ankoraŭ ne posedas ekzistojn.

Niajn aŭtorojn tre malhelpas ankaŭ la facila laŭdado de niaj tiel nomataj kritikistoj, kiuj devus fariĝi multe pli severaj... kaj fidindaj. Kun kelkaj belaj esceptoj literatura kritiko, meritanta tiun nomon, ĝis nun apenaŭ ekzistas inter ni.

Ne, ĝuste nun nia poezio — el la vidpunkto de legateco kaj socia efiko — ne vere vivas. Sed, ĉar ni ja posedas en niaj originalaĵoj kernon tre valoran, tio neniel implicas, ke mankas vivkapablo aŭ efektiva valoro. Evidente, tamen, ni urĝe bezonas, sur ĉi tiu kampo, ian REVOLUCION!

Edwin de Kock

Hungara Vivo volas scii iom pri la legateco kaj socia efikeco de nia poezio. Nu, pri tio li demandu prefere eldonistojn aŭ la Centran Oficejon de UEA. Ili povus doni ekzaktajn vendonombrojn. Mi povas diri nur, ke persone mi aĉetis plurajn Esperantajn poemarojn kaj ilin ĝuis. En nia klubo kaj baldaŭ ankaŭ en la universitata kurso pri Esperanto estis aŭdita „La voĉo de Auld”.

Dezirinde estas, ke niaj poetoj (ĝenerale: niaj verkistoj) atentu malpli ekskluzive la mikrostilon kaj pli la enhavon. Nur tiam ili povos esperi konvinki per tradukoj la ĝeneralan publikon pri la valoro de la Esperanta literaturo.

La Esperanta poezio „vivas” eĉ ekster nia rondo, ĉar Esperanta poezio aperis i.a. en franca traduko en „Poésie vivante”.

Mi mem klopodis „vivigi” „La infanan rason” de Auld ekster la Esperantomovado, tradukante ĝin en la Nederlandan lingvon. Sed mi ne sukcesis eldoni mian tradukon.

D-ro W. A. Verloren van Themaat

William Auld:

SKIZO PRI LA EVOLUO DE LA POEZIA LINGVAĴO



Temas pri la lingvaĵo uzita en la esperantaj poemoj originalaj; oni povas, kaj eble devas, rigardi la originalan verkadon en iu ajn lingvo kiel memstaran fenomenon. La originala poeto libere elektas kaj uzas tiun lingvaĵon, kiu ŝajnas al li plej uzinda kaj natura en la kadro de la tuta lingva tradicio.

I. 1887—1917

Eĉ en la plej fruaj jaroj de Esperanto, la originalaj poemoj estis verkitaj en altkvalita, simpla kaj klara Esperanto. Mankis lingvaj surprizoj: kompreneble, en tiu epoko la tuta lingvo mem estis surpriza, tiel ke esprimo nuntempe plej ordinara tiam estis freŝa kaj nova. La radikmaterialo, cetere, dum tiu unua jardeko estis relative limigita ĉar ĝi pli-malpli limiĝis al la 947 radikoj de la Unua Libro.

Eble la plej grava lingva kontribuo de tiuj tre fruaj poemoj troviĝas en tio, ke ili nemiskompreneble establis la naturecon kaj gravecon de la libera vortordo de nia lingvo, kiu netakseble fleksebligas kaj subtiligas ĝin. La akuzativa finaĵo kaj adjektiva akordiĝo laŭ kazo kaj nombro, tiel ofte kritikitaj de tromemfidaj okcidenteŭropaj aprioristoj, montriĝas efektiva riĉigo de lingvo, kiu aspiras al plej altnivelaj kaj estetikaj atingoj. Verbo, subjekto kaj objekto ordiĝas laŭ ĉiuj eblaj permutoj, kaj ne nur tio ne malhelpas la komprenon, sed kontraŭe ĝi aldonas dimension de eleganteco kaj varia trafeco. Ankaŭ la lokigo de la adjektivo, ĉu apud ĉu disde ĝia substantivo, estas libera, ofte kun trafa efekto. Interesa fenomeno ĉe pluraj poetoj estas starigo de la artikolo inter adjektivo kaj substantivo; ofte tio efikas sufiĉe ĉarme. Du aliajn eblecojn de la lingvo oni abunde kaj eksperimente uzadis kaj elprovadis. Unu estis apostrofado de la artikolo, la alia koncernis la akuzativojn de moviĝo kaj anstataŭ ellasita prepozicio (kiuj fakte estas la sama afero).

Tri lingvaj karakterizoj, kiuj *ne*, aŭ nur tre malofte, troveblas en la fruaj poemoj, estas eble tiel same signifoplenaj kiel tiuj, kiuj efektive troviĝas:

(1) Vortkunmetoj, t. e. du- aŭ plur-radikaj vor-

toj, estas vere tre maloftaj en la poemoj de la frua periodo. Antaŭ 1905 nur Kofman konsekvence esploris multekzemple tiun ĉi terenon. Post 1905 la vortkunmetoj komencis aperi iomete pli ofte, sed ankoraŭ ne ludis plenfortan rolon en la poezia lingvaĵo.

(2) Oni ne „verbigis adjektivojn kaj substantivojn”. Mi mem fakte trovas tiun ĉi esprimon bedaŭrinde missenca. La ortodoksa esperanta lingvistiko atribuas al ĉiu radiko kategoriecon, ĉu verban, ĉu adjektivan, ĉu substantivan, tiel ke ekzemple *ir-* estas verba, *ruĝ-* estas adjektiva, *frukt-* estas substantiva; kaj la ortodoksaj teorioj pri vortfarado utiligas tiun ĉi kategoriecon por klarigi la pluformadon de la vortoj. Tamen mi min demandas, ĝis kiu grado tiu sento de kategorieco deriviĝas de la neceso doni nacilingvajn tradukojn en la lernolibroj, kaj de la fakto, ke dum sufiĉe longa tempo la esperantistoj apartenis preskaŭ ekskluzive al hindeŭropaj lingvogrupoj kaj transprenis en Esperanton la penskutimojn de siaj naciaj lingvoj? Ĉiuokaze, eĉ hodiaŭ multaj esperantistoj, kiuj senĝene konstruas la serion *frukto, frukta, frukti*, ne volas konsekvence formi la serion *ruĝo, ruĝa, ruĝi*. Oni starigas la demandon: kion signifas *ruĝi*? (La ĝustan respondon, nome ke ĝi signifas: *i ruĝe*, verŝajne komprenus simpatie Grabowski, tiu kuraĝa eksperimentinto, kiu starigis siatempe la tezon, ke ekz-e *la belo* = *lo bela*.)

Tiu mia ŝajna deflankiĝo tamen koncernas nian temon almenaŭ pro tio, ke „verbigo de adjektivoj kaj substantivoj” efektive ne okazas en la plej fruaj poemoj. La unuaj ekzemploj, kiujn mi trovis, estas en poemoj de Wiktor Elski (Stanislaw Zygmunt Braun), 1910: *bluas* („Mia ĝardeno”), *vortas* („Sub la betulo”), kaj en 1912 ĉe Kozłowski („Petaloj”, p. 11): *ne bluetas jam lag’*.

(3) En la unua periodo de Esperanto metaforoj estas ekstreme maloftaj, kaj eĉ tiuj maloftaj estas — laŭ ĝenerale eŭropkultura kriterio — rutinegaj kaj plataj.

Ĝis 1912, pro tro ofte ripetita lingvaĵo (kaj ripetitaj temoj de amo, malespero kaj morto!) la inica simpleco de la lingvaĵo iom post iom ekaspektis dekadencia. Sed en tiu jaro aperis multe pli matura poeto, Edmond Privat, kiu kvazaŭ resumis la eluzitajn temojn, sed per lingvo nekompareble pli den-

sa, riĉa kaj elvokiva. Lia sincera arto kapablis multe pli liberan metaforigon kaj plensangajn rimojn; li ankaŭ entreprenis vastan uzadon de adverboj, kiuj malofte aperis en la poezio antaŭ tio — kaj kvazaŭ iniciatis tiun specialan adverbecon, tiel karakterizan en la nuna Esperanto, kiun Kalocsay nomas „kvazaŭ nova kazo, speco de ablativo, anstataŭanta la plej diversajn prepoziciojn”: *renkontis voje; vualas musline*; kaj aliaj same trafaj kaj — en tiu epoko — surprizaj.

II. 1918—1930

La postmilitan jardekduon trapontas la verkaro de kvin ĉefaj figuroj: Miĥalski, Kalocsay, Baghy, Schwartz kaj Hohlov. Ĉiu alportis sian grandan kontribuon — notinde maturecon kaj potencon — al nia poezia lingvaĵo; sed nur la unua el ili vere estis eksperimentanto lingva. Ĉe tiuj kvin poetoj oni por preskaŭ la unua fojo sentas, ke ili ne nur verkas, sed ankaŭ vivas, per Esperanto; ke tiu lingvo estas kerna, kaj ne nur akcesora, en iliaj mensoj kaj sentaro.

Dum la koncerna periodo Miĥalski eldonis tri libretojn: „La unua ondo” (1918); „Du poemoj” (1922); kaj „Prologo” (1929). Jam la vortkunmetoj abundas: *malŝat-ironie; akre-veneneca; sonserpento; song-iluzi’; penskuraĝo; korarogo; beltaga; revnebul’; kormut’; nov-amboso* (kiu, korekte, signifas *amboso de la novo*, kaj ne *nova amboso*); *santopenco*, k. m. a. Neniu poeto post Kofman — kaj denove neniu dumlonge post Miĥalski — sciis tiel trafte uzadi tiun ĉi kompaktigan econ de la internacia lingvo. Aparte menciindas tamen unu-du speciale aŭdacaj, iom eksperimentaj kunmetaĵoj, nome: *ĉielen-flugo; pensoj-ĥaos’; rememoroj-vibr’*. Kelkaj aliaj estas tiel kompaktigaj, ke ili fakte reprezentas kvazaŭ gigantan antaŭensalton, ekz-e: *satur-balzam’; arbust-kulis’; nazetone-raŭkaj; karese-edena; streĉvervas*.

Ankaŭ „verbigo de adjektivoj kaj substantivoj” pli aŭdace aperas ĉe Miĥalski: *mi volas alti; kantas-liras; sonetas; pejzaĝas; raŭpis; bluantaj; aeris; sakramentas; smeraldas; miljaris; kolombas; arrogantu; perlas; traversos* (vivon); *diafanis; papiliis; mantelas; nebulas; kulisas; najtingalis; faŭkanta; miozotas* (memor’); (nokto) *tegmentas; posthorizontas; krepuskas; golgotas; nigras; kalvas; ekbluis; araneis; flavas; pasivis; enbrakis*. Aldonindas kelkaj aliaj transkategoriiĝoj, ekz-e verbigo de adverboj montrantaj moviĝon: *kienas; ĉielenas*; verbigo de sufikso: *onas*; substantivigo de finaĵoj kaj pronomoj: *isas(o); mio; vio*; kaj tre aŭdaca uzo de verbifinaĵoj, jen kiel memstara substantivo: nekaptebla „os”, jen kiel radikoj de participo: neniam kaj ĉiam *as’anta*. Tre impresa listo, ĉi tie tute ne kompleta.

Alia esplorkampo de Miĥalski estis ellaso de sufiksoj, kiujn li juĝis nenecesaj: en *samo*, anst. *sameco*; en *solo*, anst. *soleco*; en *ŝimo*, anst. *ŝimado*, k. m. a. Iom post iom la esperanta poezio sekvis Miĥalskin laŭ tiu vojo, kvankam ankoraŭ la prozo

ĝenerale pli konservativas. Escepto estas lia ofta anatemo de la sufikso *-ul*, precipe sed ne ekskluzive kiam ĝin sekvas la sufikso *-in*: *mia karo, akrino; kunino; belino; virgino; junino*. Tion la poetoj preskaŭ neniam imitis.

La vortprovizo de Miĥalski estis granda, kaj tute ne limiĝis al la t.n. „oficiala” vortstoko. Ni trovas, ekzemple, ke en la nura „Prologo” li utiligis 38 radikojn ankoraŭ en 1960 neoficialajn, kaj li uzis ilin sume 58-foje. Tio konsistigas, cetere, proksimume 0,9% de lia vortara materialo en la libro.

En „Mondo kaj koro” de Kalocsay (1921) ni trovas abundan, kvazaŭ senpenan rimadon, internan asonancon kaj aliteracion, kiuj kune liveras potencon densecon al la sono kaj sonsignifo de la versoj; la obsedaj beleblecoj de Esperanto jam kvazaŭ enkarniĝis. Kun iom da surprizo, ni trovas, ke Kalocsay en „Mondo kaj koro” ne estas lingve tre aŭdaca. Samkiel Miĥalski, li ja ŝparas sufiksojn nenecesajn, sed aliaj atentindaj vartuzoj estas minimumaj. La vortkunmetoj ne tre abundas kaj — jen dua surprizo! — ili kelkfoje apartenas al tiu erara speco, kiun Kalocsay mem poste, kaj prave, nomis „kaŝita elizio de la adjektiva finaĵo”: en la posta kolekto „Streĉita kordo” li forigis ilin.

Sed plej surprize estas, ke preskaŭ tute mankas en la volumeto vortoj neoficialaj, kaj la sola „poezia neologismo” proponita en „Mondo kaj koro” estas *pastoro* uzita laŭ la nemetafora signifo „paŝtisto”. Efektive, kvankam Kalocsay fariĝis en la mensoj de lingvaj konservativoj vivanta simbolo de la anatemandaj poeziaj vortoj, li persone proponis relative malmultajn el ili.

Baghy, samkiel Miĥalski, majstre uzadas trafajn kunmetitajn vortojn. Samkiel ĉe Kalocsay, liaj poemoj utiligas abundan rimadon, asonancon kaj aliteracion. Speciale menciinda estas lia konsekvenca uzado de viraj rimoj. Sed okul- kaj orel-frape, en la poezio de Baghy la adverbo eniras sian reĝlandon. Estas rimarkinde, kian palan kaj subordigitan rolon ludas la adverbo en la poezio antaŭ Baghy; subite, ĉe li, adverboj svarmas. Speciale bagia estas abunda parigo de rimantaj adverboj, ekz-e: *sentence kadence; nete ridete; serene sentplene; senĉese karese; kante siblante*; eĉ: *sible susure — muĝe murmure*, k. m. a.

Konversacia estas la lingvaĵo de Schwarz, en „Verdkata testamento” (1926), „kvazaŭ”, skribis Rossetti, „la rimoj falus nature en siajn lokojn”. Sed en lingva historio li meritas sian lokon antaŭ ĉio ĉar li enkondukis kaj respektindigis la kalemburojn. Ĉiam li sciis tre lerte meti la antaŭkondiĉojn por la fina vortludo, tiel ke ĝia alveno estis kvazaŭ natura. Ekzemple, en kanto pri la esperanta kabaredo „La Verda Kato”:

*Se vi povas dum diboĉo,
Kiel sana filozofo,
Kanti per miaŭa voĉo
Gis la fina kata strofo,
Jen vi estas taŭga frato
De la Verda Kato!*

rimarku la gravecon de tiu vorto „miaŭa”.



Renkonto dum la reconstruo de Buda-fortikaĵo
— foto de Zoltán Fejér

Hohlov, la lasta el tiu ĉi kvinopo, uzis tre sensuale la lingvon en „La tajdo” (1928). Kiel la adverbulo floris ĉe Baghy, ĉe li la trafe surpriza adjektivo abundas: *lanugan* ŝaŭmon; *karmanjola* fajfo de l’ siroko; *demoneca* rido de l’ siren’; *buklaj* pinoj; *svelta* sledo, k. m. a. Tute klare, la plimultaj el ili estas metafore uzitaj. Eĉ pli ol Miĥalski, Hohlov aŭdacis uzadi vortojn neoficialajn. En „La tajdo” li utiligis 63 neoficialajn radikojn sume 81-foje, kio konsistigas proksimume 1,2% el lia vortara materialo.

Tiel per 43-jara evoluo la poezia Esperanto atingis plenan maturecon. Ĝi estis jam preta por la multkapa kaj preskaŭ tutmonda eksplodo de la t. n. *parnasismo*.

III. 1931—1951

En 1931 reaperis grava literatura revuo „Literatura Mondo”; en 1932 aperis ĉe la eldonejo Literatura Mondo la gravega verko „Parnasa gvidlibro” de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Tiuj du okazaĵoj, la unua per sia prestiĝo kaj aŭtoritato, la dua per sia konkretigo de la ĝis tiam iom nebulaj prozo-

diaj t. n. „reguloj” de Esperanto, naskis gravan florperiodon de la esperanta literaturo, interalie de la originala poezio.

Tamen la lasta parto de Parnasa gvidlibro, „Poezia Fakvortaro”, vekis fortan reagon ĉe tre multaj konservativaj esperantistoj kaj okazigis unu el tiuj sovaĝaj fratbataloj, al kiuj nia movado de tempo al tempo dediĉas sian superfluan energion. Eĉ hodiaŭ, ie-tie, iu maljunulo ankoraŭ aŭdigas sian voĉon pri tiu delonge eluzita disputtemo. En 1932 la batalo nepre ŝajnis aktuala, eĉ mondoskua.

Oni devas kompreni la psihologian fonon. Plurfoje minacis Esperanton reformproponoj, kiuj kulminis en la skisma afero Ido. Rezultis de tio vere komprenebla rigideco kaj konservativemo ĉe multaj meritoplenaj esperantistoj, kiuj klare memoris tiun skismon, kaj ĉiun novaĵon ili rigardis kaj anatemis kiel reformon. Oni vere ne povas kulpigi ilin; ilia merito estis ĝuste, ke ili savis kaj konservis Esperanton dum periodo de grava atenco. Ilia eraro estis tamen, ke ili rigardis la poeziajn neologismojn kiel kaŝitan reformon, Ido-similan, de la lingvo. Bezonon de literaturaj neologismoj tute ne rekonis homoj, kies literaturaj pretendoj kaj kompetenteco estis modestaj. Kiam ili trovis en PG liston de 602 vortoj grand-

parte nekonataj al ili, ili densigis siajn vicojn kaj laŭtigis siajn protestajn voĉojn.

Unue, ni devas kompreni, ĝuste kia estis tiu vortokolekto. El la 602 vortoj en la t.n. „poezia fakvortaro”, nur 190 (tamen sufiĉe alta nombro!) estis fakte vortoj speciale „poeziaj”. Aliaj 25 estis vortoj „familiaraj” (jam vicigitaj kaj eternigitaj en „Sekretaj sonetoj” de Peter Peneter, 1931), kaj krome registriĝis 20 interjekcioj. La ceteraj 367 vortoj apartenis al pluraj kategorioj, interalie:

1. Tre specialaj vortoj, fake uzotaj, kies uzon oni apenaŭ evitus, skribante pri la koncerna temo, ekz-e: *arkebuza, derviŝo, eldorado, gulaŝo, karavelo*, k.m.a.

2. Onomatopeoj (mem unu el la vortoj en la listo!): *bei, gaki, hojli, jelpi, knali, kriĉi, kviki, meki, glugli, ronroni*;

3. Vortoj, kiuj preskaŭ neniam uziĝis, kaj do fakte montriĝis mortnaskitaj, kiel: *baĉeloro, botono, ĉizojo, halukso, hupo, kardino, miksta, piero*, k.a.

4. Granda nombro da vortoj, tute ne poeziaj, kies uzado hodiaŭ ŝajnas tute normala kaj ordinara, eĉ en ĉiutagaj konversacioj, ekz-e: *beata, elano, etoso, fotelo, genro, kampanjo, miraĝo, nano, nervoza, pikniko, pouĉpo, refreno, saboti, sandviĉo, situi, skolto, stoko, stumblu, tajpi*.

Inter la 190 vortoj eksplicite signitaj en la listo kiel poeziaj, ni povas hodiaŭ distingi plurajn kategoriojn, ĉefe:

a) Vortoj konceptitaj kiel poeziaj, kies uzado poste tamen ne limiĝis al la poezio, sed vastiĝis eĉ al komuna uzado, ekz-e: *obscena, adoleska, bebo*, k.s.

b) Vortoj, kiuj tamen neniam, aŭ preskaŭ neniam, praktike uziĝis, kaj kiujn oni hodiaŭ nepre rigardas kiel neakceptitajn, ekz-e: *antro, bestio, bizo*, k.s.

c) Sinonimoj de *mal*-vortoj: *basa, disipi, dista* (al kiu, parenteze, poste aliĝis la samsignifa *lontana*), *dura, febla, frida, humida, kurta, lanta, leĝera, magra, olda, pigra, rara, softa, streta, tarda, trista, turpa*.

Estis tiu kategorio c), kiu precipe vekis la kontraŭstaron de la konservativuloj kaj allogis ilian fortan indignon. Ili rigardis ĉi tiujn vortojn kiel Idecan komploton por forigi la prefikson *mal*-, kaj tiel detruu unu el la fundamentaj karakterizoj de la lingvo, samtempe malfaciligante ĝin pro neceso lerni vortprovizojn tiel same grandajn kiel en la naciaj lingvoj.

Notinde, la utiliga *mal*-neniam estas uzita racie kaj konsekvence. Pro la ebleco krei la formon *malbruo*, la samsignifa vorto *silento* estas nenecesa balasto — inverse, pro la formo *malsilento* ne necesas la vorto *bruo*. Sed ĝuste tiu manko de logikeco en la materialo rezultigas, ke Esperanto estas, almenaŭ potenciale, tre riĉa je sinonimoj.

La poetoj, unuflanke, asertis, ke la poezio postulas apartan vortprovizon malpli rutinan kaj sekve pli esprimivan ol la trogurditaj ĉiutagaj vortoj; aliflanke la propagandistoj argumentis, ke Esperanto devas esti antaŭ ĉio facile lernebla, kun minimuma nombro de lernendaj radikoj. Kompreneble, estis pravo ambaŭflanke. Vere, traduki ekz-e la ekzaltitan lingvaĵon de ŝekspira soneto per lingvaĵo ĉiu-

tage rutineca estus perfidi la etoson de la originalo; sed vere ankaŭ, anstataŭiĝi oftajn *mal*vortojn per lernendaj novaj radikoj signifus rabi al la internacia lingvo unu el ties gravaj avantaĝoj. Vane la poetoj protestis, ke en Esperanto, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj, komuna kaj literatura lingvoj povas ekzisti paralele, ne damaĝante sed, male, plifortigante unu la alian.

El nia hodiaŭa starpunkto ni povas konstati, post kvardek jaroj, ke la timoj de la konservativuloj montriĝis senbazaj. Post la laŭta bruado, la rezulto estas nur jeno: ke la literatura lingvaĵo riĉiĝis per kelkdek radikoj — ofte liverantaj utilajn sinonimojn — dum la komuna lingvaĵo restis preskaŭ ne-tuŝita.

Dum pli ol dudek jaroj post 1931, la poezia lingvaĵo restis en stato *firmiga*. La rimedoj estis novaj kaj freŝaj, kaj neniu poeto sentis deziron entrepreni revoluciajn eksperimentojn. Esperanto akiris amason da belaj kaj maturaj poemoj. Estis flortempo de la poezio, kaj epoko de aŭtoritatigo de la poezia lingvaĵo, kaj de la poeziaj vortoj — kiuj transiris de la vortara anonimo ĝis la viva rajteco dum tiuj dudek jaroj.

IV.

1952—1973

Post la Dua Mondmilito aperis nova poetogeneracio; al la plimultaj el tiuj talentoj la neologismaj disputoj estis nekonata historiaĵo, kaj ili akceptis sendemande la poezian lingvaĵon, kiun ili trovis vive uzita en la verkaro. La eksplicita celo de la „Kvaropo” (Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti, 1952) estis daŭrigi la laboron de la parnasistoj, kaj tion ili faris, tiel ke lingve kaj prozodie ne aperas abrupta breĉo en la poezia evoluo. Eĉ Schwartz trovis sian posteulon en la kalemburoj de Rossetti. La ĉefa lingva evolulinio kondukis al ĉiam pli intensiva esplorado de la indigenaj eblecoj de Esperanto. Ĉe Ragnarsson („Ŝtupoj sen nomo”, 1959) kaj De Kock („Ombroj de la kvara dimensio”, 1961) ni jam rimarkas tian densigon de la lingvaĵo — pere de vortkunmetado, verbigo de adjektivoj kaj substantivoj, kaj rekta metaforigo — ke neniel videblas influo de nacilingvaj pensformoj, kaj rezultigas tia senpera Esperanto, kia potence dubindigas la ofte akceptitan supozon, ke Esperanto estas lingvo hindeŭropa. Kvankam la radikaro kompreneble fontas el tiu lingva familio, la strukturo de la vortmaterialo altgrade ne plu respondas al ties kutimoj:

*Vidante neĝon cigni krudosubon
mi sentas flokoflagron tra l' animo,
sur mensovolbo puroŝutan nubon...*

(Ragnarsson)

Postparnasismo montriĝis ĉefe per modifoj kaj eksperimentoj versformaj kaj prozodiaj, kaj tio estas ekster nia nuna temo. Eksperimentoj pure lingvaj, inter tiom da brila poezio kaj semantika virtuozece, estas relative maloftaj.

Ĉiam tre konscia eksperimentanto estas Auld. En

„Kvaropo” li imitis la lingvaĵon de ebrulo. En la kvara ĉapitro de „La infana raso” (1956), por esprimi sian malestimon pri la fienco de la politiko kaj senmoraleco de la milito, li uzas torditan lingvaĵon por doni ĉiaman dusencecon (pli subtilan ol ordinara vortludado). Ekzemplo el alia ĉapitro de la verko estas *sindikatestrofo*. En „Unufingraj melodioj” (1960) Auld por la unua fojo ekprovis ian surrealismon en la poemo „Noktaj pensoj”. En „Humoroj” Auld kontribuis al la poezia lingvaĵo per uzado de fakaj vortoj. Lia intenco estis viviĝi fakajn terminojn, preninte ilin el la vortaroj en la vivan uzadon.

Diserigon de la sintakso iom pli aŭdace prezentas Ragnarsson, precipe en sia dua poemaro „Esploroj” (1973), sed efektive, ĝis nun la poezia preskaŭ ĉiam ankoraŭ sin kroĉas tenace al la gramatika sintakso. Ragnarsson en du poemoj, kaj De Kock en la tuta longa poemo „Kvin elementoj” (1970), rezignas pri la apostrofo ĉe eliziitaj finaĵoj.

Kiam oni pensas pri Esperanto, oni certe ne pensas, ke ĝi havas abunde monosilabajn vortojn. Tamen Chaves („Animo prisma”, 1959) verkis du sonetojn konsistantajn el po 14 unusilabaj vortoj, kaj Freto („Monosilaboj”, 1967) prezentas eĉ 108 similajn versaĵojn sufiĉe sukcesajn.

La debuto de japana skolo en 1967, kaj ĉiujara plua volumo de tiu sesopo, apogeis en 1971 per „Invit’ al japanesko” de ilia „skolestro” Miyamoto. La alveno de tiu japana influo estas treege grava; kompreneble, ĝi riĉigas la lingvaĵon per sufiĉe multnombraj vortoj kaj konceptoj japanaj. Gramatike plej interesa estas sporada uzo de senrilata adverbo,

kiu donas fortan sugestian subsignifon al la frazo: *futuron mi kontemple; marondoj ŝaŭme*.

En 1969 (kun la dato 1967 pro eldonaj prokrastoj) aperis volumo, kiu ekscite vastigas la poezian vortuzadon per kuraĝaj semantikaj elanoj. En la du lastaj cikloj de „Arĉoj” de Geraldo Mattos svarmas neatenditaj sed trafaj vortoj kaj figuroj. La verbaj finaĵoj prenas sian signifoplenan, memstaran rolon:

*Nur mia lingvo povas mian vivon
diveni, ĉar ĝi as kaj os spirale
kun ĉio, kio is kaj tempegale
ĝi trudas sin kaj startas en la drivon.*

Ni troviĝas sur nova etapo de la lingvaj eltrovoj.

Kvazaŭ tio ne sufiĉus, Mattos samvolume prezentas du sonetojn verkitajn en la pra-Esperanto de 1881, tiel ke, antaŭenŝoviĝante al la malproksimaj limoj de la lingvaĵo, li samtempe retrovas niajn praradikojn. Volumo manifestanta unu kulturon kaj unu kulturtradicion! De la pra-Esperanto ĝis Kofman, ĝis Kalocsay, ĝis Mattos, tio estas senbreĉa evoluĉeno atestanta la vivantecon kaj adaptiĝemon de la Internacia Lingvo. Kvankam la lingvaĵo de Ragnarsson, De Kock aŭ Mattos estus neimagebla por tiuj bravaj pioniroj, kiuj aperigis siajn belajn lirikojn en la fruaj revuoj, ĝi estas tamen la sama lingvo, per kiu ĉiuj kantas, kaj la evoluo ne nur okazis senperforte, sed restis ĉiam nepre fidela al la fundamento kaj al la fundamentaj trajtoj de la unika lingvo Esperanto.



**MODERNECO
MAKSIMUMA KOMFORTO
MODERA PREZO
Meblofabriko
KANIZSA**

Moderna produktado—moderna produktaĵo!

Loĝoĉambroj Kanizsa—IV, Piccolo, Karina—I, Karina—II, Kékes, Kupido, Kata, Korona, Titusz, —junulara ĉambro TavasZ kaj infanĉambro Kari.

Tapetitaj garnituroj Kedvenc, Rio, Tirol, Piccolo, Titusz, Andrea unupersonaj kaj Kanizsa dupersonaj sofoj, kuŝejoj.

Petu tiujn produktaĵojn—niaj produktoj estas aĉeteblaj en la tuta lando!

Adreso: KANIZSA BÚTORGYÁR (Meblofabriko Kanizsa) 8801 Nagykanizsa, Szemere u. 4. Pf.: 55

K. KALOCSAY

STROFOJ EL „KALENDARO“

Aprilo

En blu' alaŭdo kantas kun delico.
Nubet' subita ĝin kun ŝercmalico
alŝprucas, oj! Sed baldaŭ la kantiston
karesas ree bril'. April-kaprico.

Hirundo

Hirundo! Eĉ hirundoj! Ho, salutojn!
Plezure vidi viajn fulmajn flugojn.
Kun ĉarma ĉirp' alportas vi someron
kaj kun ĝi por knabinoj la lentugojn.

Arĝento aprila.

El krispa greg' de nuboj el arĝento
ekduŝas dense pluvoj el arĝento.
La sun' ridetas dume al la flakoj
kaj ili brilas — ruboj el arĝento.

Psalmarum.

Li venas, venas! Hom-amasoj svarmaj
palmbraĉojn sternas kun glorigoj psalmaj.
Kvin tagoj pasas, kaj azen' senmastra
paŝtiĝas sur sternitaj frondoj palmaj.

Pasko.

Jubilas hor': la Morton venkis Pasko.
Inundas la animojn la lumfasko
de l' Reviviĝo. El la lumo ridas
la Morto, kiel el sub ora masko.

Georgo

Georga tago, brilu per sunrido!
Georga tago, venku super frido!
Ni vee vokas vin, ho venu varme!
Jen kiel frostotremas la kaprido!

La unua de majo.

Flagranta ruĝ' de vivo kaj de vero,
lazur' de revoj, verdo de espero —
kolorebria la homaro sonĝas
la sonĝon de eterna primavero.

Majsorĉo.

Ho majo, sorĉa maj', sub via ĉarmo
la larmo iĝas dolĉa ĝojolarmo.
Memoroj svarme en la koro hantas:
fantomoj, jes, sed kia brila svarmo!

Konvaloj.

Aŭskultu bone: la konvaloj per la
sonoriletoj de l'floraro perla
kun fee fajna tinto akompanas
la trillfontanojn de l'orkestro merla.

Pentekosto.

Okazis foje — kunfandiĝis ĝoje
per fajrolangoj ĉies kor' aloje.
Okazis foje — diras la legendo,
kaj flustras homa rev': okazos foje.

Grenkampo.

Kia kontrasto en la kampo grena
de papavetoj kaj cejanoj plena
la frenezume flagraj sopir-ruĝoj
kaj ĉiel-ruboj de revad' serena!

Lilioj.

Lilioj, ho lilioj de l' ĝardeno,
ĉi arda blanko kaj ĉi frida spleno!
Parfum' ilia estas tiel peza
kiel la am': balzamo kaj veneno.

BALDUR RAGNARSSON

LA KONDAMNITOJ

La kondamnitoj
direktas siajn fermitajn okulojn
super la tenebrejojn de la sonĝoj.
Iliaj sentrajtaj vizaĝoj
formas netransireblajn barojn
defiomankajn, preskaŭ nevideblajn,
en la kruela taglumo de la mondo.
Post la seneĥaj neasertemaj muroj
la ombroj de iliaj pensoj alklinas orelojn,
atendas malteatre
pro la seka susuro de la vortoj liberigaj
kiujn ili kredas sin kultivintaj en sekreto
sub siaj delikataj kranioj.
Kaj kvankam okazos ne tio
ne estas vana ilia atendado,
tion ili konstatos
kiam paliĝos la lumoj
kaj oni krios tra tranĉe ilian helpon
dum la sufokiĝo.

VICTOR SADLER

PLEDO

Memvole mi konfesu: mi herezis.
Poemoj estas atestantoj.
Mi, sinjoroj,
kiun vi instruis pri pento kaj peko,
kies nudon vi vestis, kiun, soifan vi satigis,
kiun vi ridigis, ĉar mi ridige ridis,
mi kredis ekziston mia, donacita, kvazaŭ juvelo
sekretebla,
kaj serĉis solan lokon, por ĝin faceti kaj poluri.
Ne verdiktu jam; aŭskultu plu:
mi venis propravole (se vi pardonos ĉi esprimon) —
mi ne lacigis demandantojn. Ne necesis premo.
Skribistoj, notu miajn vortojn:
mi kredis min sola kiel la ĉiomo. Mi herezis.
Memvole mi konfesu:
mia penso estas eksteraĵo, propran mi ne havas;
mia ĝojo estas birdo, mia fiero arboj, aliaj ne troviĝas;
miaj amoj estas vi kaj vi,
nenio ena,
memoro kaj espero
nur aliaj amoj;
soleco, nokto, forgeso, spaco, silento
estas mankoj, kiuj sen mankanto
ne havus nomon.
Vidu, mi indulgis neniun ajn falsajon.
Se mi mensogus, min akuzus miaj vortoj,
ĉar ili ŝtelis mian pledon al si mem,
kaj min forlasis.
Poemoj estas atestantoj.

LAJOS TÁRKONY

KVAR SEZONOJ EN 1919


Jar' por mi grava: aĝ' de dek ses jaroj!
Post morto de la mondmilita monstro
en printempventoj spiro pli liberis,
venis mondfesta majo, proksimiĝis
jubilo knaba: la ferio granda.
En gimnazio de l' piaristaj patroj
el miaj revoj en la klasa benko
surpriz' min vekis: civilvesta viro
envenis, sin prezentis: „Inĝeniero
Szász” kaj proponis, ke li Esperanton
instruus al lernemaj. Mi, revulo
blondkora, min por sessemajna kurso
anoncis kaj post lernojar' vizitis
eĉ klubon Esperantan. Tie poste
mi kuraĝegis partopreni ankaŭ
konkurson de traduk' per Gárdonyi-
novelo kaj kun granda ĝoj' ekscita
sciigis, ke ĝi estas premiita.

Printempo naskis min en Esperanton.

Someris, kiam al naĝej' irante
por ĝui tie mian solan sporton,
afiŝon sur knabinlerneja pordo
mi vidis ĉe pasumo kaj algapis.
Invitis la afiŝo somerumajn
lernantojn de l' distrikto por kunveno.
Pri l' naĝo forgesinte, mi eniris
en grandan lernoĉambron inter multajn,
apenaŭ jam troviĝis por mi loko.
Silente iĝis nun: parolantino
envenis kaj rakontis kaj eksplikis
entuziasme entuziasmigajn
aferojn pri l' naskiĝ' de mondo nova,
tiel ke ŝi batigis mian koron.
Mi altiriĝis al kunvenoj plujaj,
ekscitaj per instruo kaj diskutoj,
kaj ŝajne mi eĉ distingiĝis tie,
ĉar kiam venis tago de baloto,
min trafis ĝoj', kiun mi ne konjektis:
en gvidantaron oni min elektis.

Somero naskis min en komunismon.

Septembro venis: fin' de l' mondo nova.
En gimnazio, lerno-jar-komence,
malfide, fride strabis kontraŭ mi la
okuloj, post mi siblis interflustroj,
eĉ, krome sekvis disciplin-enketo.



Feliĉe, min en ties komitato
protektis prezidanto Providenca:
poeto Sándor Sik: de li, de mia
literatura profesor' mi lernis
ami poemojn, kaj li tion sciis.
Kaj li min savis de l' eksiga puno.
Tiel min ne deŝiris la aŭtuno,
velkigis tamen mian stipendion.

Alvenis vintro, kaj jam ŝajnis, ke
glatiĝos ĉiuj ondoj ĉirkaŭ mi,
kiam subite nova plag' minacis:
terura komplikaĵo, kria krizo:
sur la mantelo vintra mi ekportis
kvinpintan stelon, verdan, Esperantan.
Patrinon mian vokis la klasestro;
riproĉe diris al ŝi, ke li scias,
ke l' stelo verdas, tamen, ĝi kvinpintas!
Ĉu oportunas al la fil' ĝin porti?
Tamen mi riskis porti la insignon,
en mia kor' ĝi ardis dukolore,
verde kaj ruĝe, unu, sed ĝemelo,
donac' de l' jaro: la kvinpinta stelo.

Poezio kaj eldonisto

Kiam mi startis kiel Esperanto-eldonisto, antaŭ 22 jaroj, la unua titolo estis poezia verko, nome *Kvaropo*. Mi devas lojale agnoski, ke temis pri atuta libro, kaj ke, tiam, en Esperantujo, post la dua mondmilito, regis vakuo pri bona beletro, des pli, ke ankaŭ la gazeto „Literatura Mondo” estis jam mortinta. La dua libro de mi eldonita, *La baptado de caro Vladimir*, kunportis, sub sia virtuoza poezia vesto, tiel mirindan traduklingvaĵon, kvazaŭ temus pri supera originalo. La unua fulme, la dua tuj disvendigis. Tiuj inaŭguraj sukcesoj invitis min serioze konsideri daŭrigon je tiel bonaŭspicia akcepto — kio komence ja ne estis mia intenco! Poste, plene ensuĉita de tiu eldona vakejo, mi alternis prozajn kaj poeziajn librojn, sed kun iom pli da emfazo al poezio. La sola verko je kiu mi faris duan eldonon, *La infana raso*, estas ja eposo, nia unua eposo, kies mesaĝo ne al ĉiuj estis tuj senpere alirebla. Kaj la dua libro je kiu mi planas duan eldonon estas ankaŭ poezia verko, nome *Proverbaro Esperanta*, eble la plej alta poezia kreaĵo de Zamenhof.

Mi do povadis, laŭ propra sperto, konstati, ke Esperanto preskaŭ nature sekvas la evoluvojn de ĉiu beletra lingvo, kie unue aperas la poezio (popola, lirika, rakonta), poste la prozo, ankoraŭ pli poste la esejo, kaj, je ankoraŭ pli longa distanco, la teatro. Jes, mi eldonis originalajn poemarojn kaj eserojn, kiuj tute inde povus ambli apud la plimulto de la etnaj beletroj. Sed ankoraŭ ne sin anoncis originala teatraĵo, kiun mi povis senrezerve agnoski, ĉar la jam elĉerpitan *Sonĝe sub pomarbo* mi apenaŭ povas konsideri tia, el enhava kaj struktura vidpunktoj, sed pleje kiel dialogitan lirikaĵon.

Tiel mi povas diri, ke mi estas, ĉefe, eldonisto de poezio en Esperanto, kaj prefere de originala poezio. Mia opinio estas, ke nur fosante nian propran sulkon, nur eldone subtenante la kulturadon, aparte de nia originala beletro kaj ĝenerale de nia originala literaturo, ni povas doni al la Movado tiel firman grundon, ke nenia socia disskuiĝo aŭ ŝanĝo povos ĝin premsuĉi aŭ fornei el la monda kulturhistorio.

Multfoje oni kritikis min — kaj foje-foje eĉ tre akre —, ke mi tro donas lokon al poemaroj; kelkaj el inter la ordinaraĵ libroservoj lastatempe eĉ nuli-

gis siajn konstantajn mendojn por poeziaj kaj restigis la konstantecon nur por prozaj libroj, plendante, ke poezion oni ne aĉetas. Eĉ la recenzo foje-foje ne estis pli milda: ekzemple min oni iam surdraŝis, per kritika raporto aperinta en iu gazeto koncerne talentodebutan libron de mi eldonitan, ke per ĝia lanĉo mi nur malŝparis laboron, paperon, tempon kaj monon — eble ĉar tiu poemaro (temis ja pri poemaro!) prikantis la zorgojn de unuopa homo, for de tio, kio al li ŝajnis esti en lia lando nur gluma pano ideologia... Aliflanke, pluraj amikoj, el ili kelkaj kleraj kaj kun fakaj konoj pri beletro, apenaŭ povis kompreni, ke mi donis vicon al libro, kia *Sub stelo rigida*... Kaj tamen!

Nu, ĉiam, kiam mi konstatas, ke en Esperantujo sin prezentas homo, kiu havas atentindan kapablon por verkado, mi tuj volas kunhelpi. Nia propra kulturo ne estas tiel riĉa, ke ni povus permesi al ni la luksaĵon forlogi eventualajn atutverkistojn. Ne estas mia kulpo, ke, proporcie, produktiĝas multe pli da bonaj originalaj kaj tradukitaj poeziaĵoj, ol prozaĵoj. Je mia pritakso ne ĉiam mi plene sukcesis. Sed laŭ aprecoj de bonaj konantoj de nia originala beletro, en normalampleksa antologio de la Esperanta poezio, certe apenaŭ povus manki peco(j) de ĉiu poeto, kiun mi libre debutigis aŭ eldone apogis. Krome, mi estas konvinkita, ke tia antologio, se farita laŭ strikte artaj kriterioj, similaj al tiuj de antologioj konsekritaj al etnaj kulturlingvoj, neniel devus sin senti cindrulino apud la tutmonda beletraro.

La unua eldono de *Esperanta Antologio* estas praktike elĉerpita. Nun amiko Auld preparas duan ĝisdatigitan eldonon, kun la elsarkoj kaj aldonoj, kiujn al li diktis la 15-jara sedimentiĝo de la unua eldono kaj plua evoluo de nia originala beletro. Tiun poemaron mi eldonis je duobla nombro ol ordinara titolo, kaj mian fidon je nia propra kulturo pravigis ĝia se ne fulme rapida tamen promese senhaltita disirado. Mia sperto estas, ke kiam temas pri normale bona verko, ĉu proza ĉu poezia, same originala kiel tradukita, ĝi bone debetiĝas, sendepende de tio, ĉu ĝia vendoprezento estas pli aŭ malpli alta (inter akcepteblaj limoj, kompreneble).

Kiel eldonisto mi estas do aparte feliĉa, ke mi

donis al Esperantujo okazon aŭdienci al la Skota Skolo kaj al multaj korifeoj kaj epigonoj de la Budapeŝta Skolo, apud kiuj elpaŝis poetoj de Islando ĝis Sudafriko, de Brazilo ĝis Japanujo, sen manko de voĉoj el socialismaj landoj.

Se nun oni petus min vortigi aparte elstarajn travivaĵojn dum mia esperantista eldonagado, menciante nur forpasintajn poetojn eble mi devus unue iri al la naskiĝo de *Ekzilo kaj azilo*; amiko Kalocsay skribis al mi, ke mi ĝisfunde feliĉigis la lastajn tagojn de ĝia aŭtoro, Emeriko Baranyai, la humila proleto, verkinto de tiel inspiraj pecoj kiel *Eterna lulkanto* kaj kiu en strofo de aŭtobiografia poemo diris:

Mi verkis versojn, gazetartikolojn,
mi lernis dogmojn kaj aniĝis skolojn,
mi legis prozon mute, versojn kante,
movadis, esperantis esperante,
pro la movad' eĉ perdis amatinon,
kaj tamen ne akiris skribmaŝinon...

kaj sekve devis, jam senespere malsana, kuri tienreen por tajpigi siajn kreaĵojn kaj prestaĝe povi sendi al tiu kvazaŭfabela eldonisto, kiu akceptis

ilin eldoni sur la foraj, mondrandaj Kanarioj: kun la piedoj jam en la ingoj surrajde al transejo, brulanta pro febreĝo, li ankoraŭ senerarigis la presprovaĵojn de libro, kies pretan aperon tamen la senindulga fato ne permesis al li ĝisvivi. Ankaŭ amiko Julio Baghy ĝojegis, kiam atingis lin la unua aviadile sendita ekzemplero de *Cielarko*, kiun letere li diris al mi sia cignokanto. Kaj simile mi povus skribi pri tiu ora homo, mia koramiko Tomaso Pumpr, kiu parfumis mian vivon per sia saĝo kaj per la ekzemplo de sia senbrua martira elteno. Aŭ pri mia tre karmemora Rajmondo Schwartz, kiu, jam ne povante mem tion fari pro kruela malsano, sufloris al amantaj manoj kvitanci al mi la feliĉigan alvenon de ... *kun siaspeca spico!*, per tiel senpeze amikaj registroj, ke en ili nur homo intime inicita pri la ŝvarcologio povus ekdetekti grandaniman adiaŭpirueton...

Ke mi tiel kunhelpis kreskigi flugilojn al multaj el niaj reprezentaj poetoj, estas unu el miaj profundaj ĝojoj de eldonisto. Ĉar — tio estas mia intima konvinko —, se en la komenco Esperanto sukcesis viviĝi, tio fundamente ŝuldiĝas al la fakto, ke Zamenhof estis mem poeto; kaj se Esperanto evoludis kaj plue perfektigis kaj fortikiĝas kiel beletra — do kiel neforvelkebla — lingvo, tion ni aparte ŝuldas al nia floranta poezio.

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo nutraj-pavilono

EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono

EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo

EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo



UTASELLATÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno, Budapest, V., Veres Pálné u. 24. Telefon: 189-900/160

AŬTORITATULO

Multfoje oni konstatis jam, ke Esperanto — kvankam ĝi celas la bonon de la tuta homaro — estas aparte utila por la malgrandaj nacioj. Kaj ŝajne la malgrandaj nacioj kvazaŭ eksentis tion, ja ni trovas — almenaŭ en Eŭropo — ĝenerale pli evoluintajn movadojn en la malgrandaj landoj.

Hungarlando ankaŭ apartenas al la kategorio de tiuj malgrandaj nacioj, eĉ, ĝian situacion pligravigas la fakto, ke la hungara lingvo en Eŭropo estas praktike senradika. Ne mirinde do, ke Esperanto en Hungarlando estas relative populara, kaj ankaŭ la fenomeno de la esperanta literaturo ne estas fremda al la hungaraj esperantistoj.

Ilia literatura aktivado kulminas en la vivoverko de la „granda kvino”: Baghy, Kalocsay, Baranyai, Szilágyi kaj Tárkony. Tamen, la esperantlingva verkado, aparte la poezikreado jam floris en Hungarlando antaŭ la jaro 1922, kiun markas mejloŝtone la apero de Baghy kaj Kalocsay.

Jam *La Verda Standardo* — revuo de la hungara esperantistaro antaŭ la unua mondmilito — donis abundan spacon al la originala verkado, speciale al la poezio. Kompreneble, la plimulto de la kontribuajtoj ne superis la tiaman kutiman diletantan nivelon, tamen, ni renkontas sur la paĝoj de la revuo kelkajn nomojn, malinde forgesitajn de la esperanta literaturhistorio.

Elstaras inter ili Rezső Rajczi (1886—1919), kiu mortis juna pro pulmmalsano, ricevita en karcero de la faŝisma reĝimo, venkinta la unuan hungaran proletŝtaton. (Antaŭ kelkaj jaroj la Fervoja Sekcio de HEA — li estis fervoja oficisto — omaĝis al li per inaŭguro de memortabulo.) Liaj poemoj ankaŭ nun legiĝas kun ĝuo: ilia pleja virto estas la surprize zorga forma ellaboriteco kaj la nature flua lingvaĵo. Se li ĝisvivus la florepokon de la rondo de Literatura Mondo, certe li kreus valoregan vivoverkon.

Alia atentinda nomo (?) sur la paĝoj de *La Verda Standardo* estas tiu de Drip. Mistera persono, indikon pri li vane mi serĉis ankaŭ en la Enciklopedio, kvankam laŭ la poemo *La simio* (*La Verda Standardo*, 1910, p. 25.) li meritus konsideron. La samo validas pri René Nagy: inter ŝiaj poemoj speciale elstaras *Testamento* (*La Verda Standardo*, 1914, p. 68.) Ne malbonajn poemojn verkis ankaŭ Ágoston Marich, kies nomo estis sufiĉe konata ankaŭ en la internacia movado. Plua interesa persono estis Endre Hevesi (ankaŭ pri li mankas indikoj en la Enciklopedio!): liaj poemoj aperas en la jarkolektoj de la unua periodo de Literatura Mondo.

Tamen, la granda epoko de la hungarlanda esperanta poezio komenciĝas en 1922, per la apero de *Preter*

la vivo de Baghy kaj *Mondo kaj koro* de Kalocsay. Tiuj du gigantoj almenaŭ dum tri jardekoj estis konsiderataj kiel reĝoj de la esperanta poezio, kaj, kvankam ili verkis poezion ege diferencon unu de la alia, eĉ la moderna originala poezio surhavas ia stampon de ili ambaŭ: Kalocsay normigis la versfaradon kaj elminis multajn latentajn eblojn de la lingvo, Baghy donis modelon de facile alirebla, populardestina — kvankam foje-foje estetike dubvalora — poezio. Certe, sen unu aŭ alia el ili nia nuntempa poezio ne estus sur la nivelo, kiun ĝi efektive konkeris por si.

Eble multaj ne scias, ke Ferenc Szilágyi — kiun poste forlogis la prozo — komence verkis multe ankaŭ kiel poeto. Kaj oni devas aldoni, ke ne sensukcese: la Esperantan Antologion eniris kvar poemoj el lia plumo. Eĉ inter tiuj kvar elstaras la triste rezigna *Vivraporto*.

Apartan koloron en la hungarlanda — kaj ŝajne en la tuta — esperanta poezio havas la poezia verkaro de Imre Baranyai (Emba). Li estis vera socialista poeto, kaj diference de liaj multaj kolegoj-poetoj, lia poezio estas ankaŭ estetike altvalora. Bedaŭrinde, tiu unika vivoverko estas mal multe konata ekster Hungarlando, kvankam Stafeto eldonis liajn poemojn en tre inda prezento jam antaŭ pli ol dek jaroj (*Ekzilo kaj azilo*).

Inter la hungarlandaj esperantaj poetoj la plej forta lirika talento estas certe Lajos Tárkony (*Totsche*). Legante liajn poemojn oni havas la impreson, ke la versoj kvazaŭ nevole elfluas el lia plumo, eĉ, se li ne volas krei poezion. La liriko por li ne estas literatura esprimformo, sed normala komunikmaniero. En lia verkaro sinteziĝas ĉiuj lingvaj kaj formaj atingoj de la skolo de Literatura Mondo: li mem ne eksperimentas plu, sed majstre aplikas tiujn ĉi atingojn kreante vivoverkon tute unikan en nia poezio. Oni povas aserti sen troigo, ke lia volumo *Soifo* ĝis nun estas — kaj verŝajne ankoraŭ longe restos — la kulmino de la persona liriko en la Internacia Lingvo.

Hungaroj ankaŭ dum la lasta tempo ne ripozas, kvankam, sendube, novuloj ne tro abundas. Ĉu elĉerpiĝis la „internaj rezervoj”? Tamen, meritigas mension la nomo de Julio Varga, kiun foje-foje oni renkontas inter la premiitoj de Belartaj Konkursoj, kaj speciale de Pál Avar kaj Aurél Ponorí *Thewrewk*, kiuj antaŭ kelkaj jaroj debutis sur la paĝoj de Hungara Vivo kun surprize maturaj poemoj, sed bedaŭrinde daŭrigo ne sekvis. Kial? La originala poezio ĝis nun ŝuldas valorajn atingojn al hungaroj. Kaj la forto de la tradicio devigas...

Vilmos Benczik

*Grasnuk, la respektinda porko,
sin rulis sen zorgo
en la koto bonodora,
kaj al sia trup' fervora
da adeptoj
sentencis pri la poezio kaj ĝiaj
receptoj.*

*„La belon mi ĉiam amis”,
li proklamis.
„Oni nomu min laŭvole sibirito
pro jena cito,
sed rave bela estas mergo
en la aroma sterko.
La suno estas bela nepre,
kiam ĝi eble
sur mia dorso varmas.
Oni diras eĉ, ke ĉarmas,
se la povra lunradio
grizas.
Min tamen tia opinio
surprizas!
Ja, se mi nokte sidas
ekstere,
ĉi lunon mi apenaŭ vidas
vere!
Kaj pri la 'steloj' kion diri?
Nu mi simple devas miri,
kiam oni parolas tiel abstrakte
pri io, kio ne ekzistas fakte!
Ĉu iu povas vidi tiujn stelojn
fabelojn?”*

*La poezia belo estu vero,
sed ne kimero
de la febranta fantazio!
Bela, ekzemple, estas la lilio.
Laŭrakonte
ĝi simbolas senkulpon,
kaj cetere ĝian bulbon
mi manĝas volonte.
Sed la rozo!
Mi diras sen pozo,
ke tiuj nur hipokritas,
kiuj ĝin citas
por la estetiko.
Ĉu do belas la histriko,
kiu kuras sub mian ventron
kaj pikas mian molan korpocentron?
Do al fornoj
la rozo kaj ĝiaj akraj dornoj,
kiuj la langon pikaĉas,
se mi ĝin maĉas.
Ne, for el nia poezio
tiu ĉi blaga iluzio!
Ni iru nur la vojon de la belo
al plej alta,
plej alta
nivelo!”*

*Kaj, dum admire jesis la skolanoj,
Grasnuk la nazon kaŝis en la branoj.*



Nudo — desegnaĵo de András Cs. Nagy

MIYAMOTO MASAO

KUN LA AŬTORO DE HIRUNDLIBRO

Ĉi tie ne estas Germanio,
kie venas hirund' al fenestro kradita;
ĉi tie estas Japanio,
kie regas la drasta, orienta absolutismo,
sed ankaŭ tie brulas profunda veo de la juno!

Unua monato — nenies vizito, nenia provizo
kaj nenia pridemando;
matene — kriĉo de provoso,
vespere — obtuzas provoso,
nokte — katsimila ŝtelpaŝo de gvatanta provoso
kaj klaketo de klapo de gvatotruo.

La dua monato — same,
la plumpan monotonon rompas nur:
dekkvinminuta gimnastiko en sektora korto,
kies centron okupas gardejo kun lupaj okuloj;
kvinminuta baniĝo unufoja en semajno
sub kontrolo de ŝtelistaj okuloj de provoso,
jes, ĉiam de provoso, provoso, provoso...

La tria monato — same.
La kvara monato — ankaŭ same.

La tuta jaro — same morne kaj plumpe...
La dua jaro — ankaŭ same morne kaj plumpe...

Somere sufokas nin senmova aero en betonitaj muroj,
nur kun alta eta fenestro, trans kiu ĉiuvespere
venas lontana brueto de tramo, kiu kuras al mia
hejmloko.

Vintre fridigas nin senmova aero en betonitaj
muroj,

nur kun...

Sajnas ke jam pereis eĉ Ruĝa Helpo;
ĉu la partio? ĉu la junulara ligo, ĉu la sindikato?

Ha, kial mi devas ŝimi en tiu ĉelo?

Ĉu ĉar mi organizis strikon kontraŭ salajroredukto?

Ĉu ĉar mi organizis kontraŭmilitan mitingon?

Ĉu ĉar mi apartenas al la partio postulanta la juston?

Ĉu ĉar...

Brulas, brulas profunda veo de mia juno
ne en Germanio,

kie venas hirund' al fenestro kradita.

Ho, mia juno povra kaj fiera antaŭ kvardek jaroj!

REZSŐ RAJCZI

TEATRO

*Mirakla mondo, kie ĉio brilas
Kaj kie regas reĝoj kaj princinoj,
La grizan vivon kiu ne similas,
Kaj kie vivas homoj laŭ inklinoj.*

*Hejmland' de ĉiu belo ekzilita
El ter', de siaj filoj duonpatro:
Jen en imago febre ekscitita
Aperis iam al mi la Teatro.*

*Kaj nun: bombastaj vortoj, movoj
Patosaj, kiuj ĉagrenige lamas
Post nia altfluganta fantazio.*

*Ni vidas — kaj disiras iluzio —
La ĉifonaĵojn, kiuj ĝin ornamas,
Malgaje kaj kun kuntiritaj brovoj.*

1913.

GERALDO MATTOS

101

*La penso senutilas pli, ol stango,
kie sekiĝas viaj vestoĉenoj;
sed gravas vent': por seki ĝis la rando,
sufiĉus suno, vento de l'ebenoj...*

*Sen ia penso, arboj same rektas,
ĉar ilin kontentigas sole resti;
estas la ŝton', kaj penson ne reflektas:
nenio estas vivo, krom nur esti!*

*Kaj la vivul' ignoras, ke li vivas:
sed la viverojn la demando stivas,
se nur neniaj venos la respondo;*

*respondo penson, penso morton ŝovas,
kaj morti as ne pasi en la mondo:
kial demandi, kie vi vin trovas?*

(El la sonetaro Arĉoj)

NOVA RIKOLTO

Pensoj pri la originala poezio post la Esperanta Antologio

La *Esperanta Antologio*, kiu estis certe la plej valora omaĝo al la Zamenhof-centenario, post sia apero suferis multan kritikon. Oni diskutis pri la bapto de la periodoj, pri mankoj kaj superfluaĵoj, sed post kelkaj jaroj tamen la kritikon forblóvis la tempo, kaj ĝi fariĝis — tute ne senmerite — la „ora libro” de nia poezio. Per tiu ĉi libro fariĝis alirebla la poezia tradicio, kaj manko de tio jam forte sentiĝis en nia kultura vivo. Tial la dato de ĝia apero sen ia ajn dubo estas nomebla mejloŝtona en la historio de nia poezio. Apartan laŭdon meritas la *Antologio* pro la kuraĝaj redaktaj principoj: en ĝia fina parto abundas nomoj, kiuj eniris la kolekton nur surbaze de kelkaj promesplenaj poemoj, aperintaj sur la paĝoj de *Norda Prismo* kaj *La Nica Literatura Revuo*.

La redaktado de la *Antologio* estis fermita en 1957, la libro aperis en 1958. Oni ne povis scii, kio sekvos poste: ĉu de *Kock*, *Ragnarsson* kaj la ceteraj disvolvos inde sian talenton aŭ iliaj nomoj restos sur la paĝoj de la *Antologio* jam post jardeko nur signoj de ĝena redaktora eraro de *Auld*? Ĉu sekvos daŭrigo, kaj se jes, kia? Nu, en tiu demando la forpasinta tempo pravigis la optimistojn — la aperigo de la *Antologio* atingis sian celon: ĝi donis impulson al la poezikreado, kaj baldaŭ la merkato pleniĝis per la poemlibroj de la novbakitaj poetoj. (Kompreneble tio ŝuldiĝas grandparte ankaŭ al la vigla eldona agado de la mirinda *Stafeto*!)

Sinsekve aperis la poemaroj de *Ragnarsson*, de *Kock*, *Urbanová*, *Rossetti*, antologio de jugoslavaj originalaj poetoj (*Reeĥo*), *Thorsen* kaj ankoraŭ de multaj aliaj. Ege variigis ankaŭ la gamo de la poetoj karakteroj: la legantoj povis ĝui en la sama tempo la figuroriĉan filozofiemon de la sud-afrika de *Kock*, la senbridan, aŭdacan pasion de *Urbanová*, la superrealismecan guston de la *Ragnarsson*aj poemoj, la parnasisme vestitajn konsternajn metaforojn de la brazilano *Mattos* — unuvorte, nia poezio prezentis ĝojinde buntan bildon.

Sed la sesdekaj jaroj donacis la esperantistan legantaron ne nur per la poemaroj de novbakitaj poetoj: aperis unu post la alia ankaŭ la poemlibroj de la maljuna generacio, kies plimulto siatempe debutis sur la paĝoj de *Literatura Mondo*: inter tiuj elstaras la *Soifo* de *Tárkony*, *Ekzilo kaj azilo* de *Baranyai*, *Duonvoĉe* de *Maŭra* kaj *Norda naturo* de *Dresen*. Tiuj ĉi libroj — same kiel la *Antologio* mem — kontribuis al la interna koheriĝo de nia poezio, nome la kremo de nia poezia heredaĵo fariĝis atingebla por la legantaro.

Sed ni revenu al la produkto de la „post-antologia”

periodo. Kiaj tendencoj karakterizas la sesdekajn jarojn, kiaj skoloj formiĝis?

Nu, pri skoloj ne eblas paroli — el la anoj de la iama skota skolo vere aktivas nur *Auld*, kaj la „novuloj” preskaŭ ĉiuj iras propran vojon. (Formiĝon de skoloj cetere malhelpas ankaŭ la geografia diseco de la poetoj.) Tamen, tiu ĉi nova poezio havas kelkajn okulfrapajn komunajn trajtojn: sentiĝas ĝenerala konscia klopodo hejmigi en Esperantujo la rezultojn de la moderna monda poezio, sinkronigi la esperantan poezion kun la mondaj fluoj. (Eĉ la plej esoteraj poeziaj tendencoj havas sekvantojn: oni pensu pri la streboj de *Nogueira* por la t.n. „vorta poezio”.)


Tiu klopodo sentiĝas en tri aspektoj: en la produkto oni spertas komplikiĝon kaj densiĝon de la lingvaĵo, fortan socian ligitecon kaj internaciismon, prozodiajn kaj rimteknikajn novaĵojn. Siatempe *Parnasa Gvidlibro* kreis normaron, kiu multe kontribuis al la maturiĝo de la esperanta poezio — tamen, en la sesdekaj jaroj ŝajne alvenis la tempo de la necesa devojiĝo de tiuj normoj: la plej originalaj talentoj serĉas novajn formojn, adekvatajn al sia direndo.

Dank’ al tiu ĉi poezia florado almenaŭ la kremo de nia poezio vere fariĝis sinkrona kun la mondaj fluoj. Kiu el niaj poetoj pleje kontribuis por tio? La respondo malfacilas, ja ĝin evidente influas subjektivaj faktoroj, tamen mi ne hezitas skribi la nomojn: *Auld*, de *Kock*, *Ragnarsson* kaj *Sadler*. *Auld* elstaras kun sia socia ligiteco kaj verama pasio (ĝuste pro tio la volumo *Humoroj* ŝajnas al mi malpli sukcesa), de *Kock* unuavice kun siaj originalaj metaforoj kaj spontanee poeta mondovido (tamen lia lasta *Poemaro kaj prozeroj* estas malpli konvinka), *Sadler* kun la mirinda denseco de la lingvaĵo kaj la majesta interpreto de la sentoj de homo, baraktanta en la reto de la senkultura civilizo, *Ragnarsson* kun la celkonscia „esplorado” de la realo, kaj kompreneble kun la perfekta harmonio de enhavo, lingvo kaj formo.

Kion alportos la estonto? La perspektivoj ne ŝajnas malbonaj, ja poeziaj talentoj se ne abunde, tamen troviĝas en sufiĉa nombro, eĉ, ĉiam aperas novaj homoj. (Laste kaŭzis agrablan surprizon la *In-vit’ al japanesko* de *Miyamoto masao*.) Ni esperu, ke la modernigaj eksperimentoj estonte alprenos iom pli de disciplinemo, kio povos siavice vigligi ankaŭ la kontaktojn kun la legantaro. Ĉar oni ne forgesu: poemlibro sen legantoj estas nur papero makulita per presinko...

V. Benčič

EN KOMUNA LINGVO SONU LA KOMUNA INTERESO:



Skribu sur [^]ciu letero



DIREKTANTAN NUMERON!

Sur [^]postajoj [^]sendataj el Hungario al eksterlando la sendanto skribu [^]ce sia adreso antaŭ ^vla direktanta numero la literon H

Penso-eroj pri Esperanto liriko

Estas bedaŭrinde, ke la hungara literaturo eminentas per sia poezio, ne per siaj romanoj aŭ dramoj. Nome, se niaj epikaj aŭ dramaj artospecoj atingus la nivelon (fronton, profundecon, forman perfektecon) de nia poezio, la mondo rigardus la hungaran literaturon samvalora kun la plej grandaj de Eŭropo. „Kulpigenda” estas nia mirinde malfacila finno-ugra lingvo, en kiu verbo povas rimi kun substantivo, eĉ verbo pasintforma kun substantivo akuzativa, en kiu la heksametroj de Homeros kaj la sonetoj de Shakespeare same sonoras bele. Sed kiu kuraĝas kaj inklinas traduki hungarajn poemojn en la anglan aŭ francan lingvojn? Kaj kiu sukcesas? Malmultaj kuraĝas, eĉ pli malmultaj sukcesas. Kiu entreprenu do la konigon kaj disvastigon de la literaturo de malgrandaj popoloj kun malfacilaj lingvoj? Kompreneble tiuj popoloj mem. Kaj kiu povas traduki la literaturaĵojn verkojn de tiuj popoloj? Kaj en kiun lingvon? Mem-kompreneble: esperantistaj poetoj, tradukistoj, en Esperanton.

Pri tio kaj similaj aferoj mi pensadis iun tagon kaj provis respondi du demandojn. Unue: Ĉu estas eble verki originalan poezion (ne versaĵojn, poezion) en Esperanto, al kiu artefarita lingvo mankas grava elemento de poezio, la granda diverseco de rimoj? Due: Se troviĝas homo, kiu naskiĝis poeto kun la bezonata kapableco, pasio kaj kuraĝo, ĉu li [aŭ ŝi] ne verkos en sia dolĉa gepatra lingvo, sed en lingvo lernita, eĉ se tiun lingvon li amas tiel pasie, kiel la gepatran? Ĉu estas kaŭzoj, ia klarigo por li verki ekzemple en Esperanto?

La unua demando. La plej okulfrapa elemento de versaĵo estas la rimo. Almenaŭ por esperantistoj, kiuj, post du monatoj da lernado, komencas rimigi verson al verso kaj post kelkaj dubvaloraj sukcesoj ili imagas sin poetoj. La hungaroj estas dorlotitaj per la enviinda diverseco de rimoj, tial se temas pri poezio, nia unua penso estas la rimo. Sed se ni ĉirkaŭrigardas en la literaturo de la mondo, ni devas konstati, ke la rimo estas nur *unu* elemento de poezio, unu kaj la plej facile neglektebla elemento. [Ĉi tie mi parolas nur pri finrimoj, ne pri aliteracio!] Estus instruplene citi versojn el la psalmoj de la Biblio, aŭ el la helena kaj romiana poezioj, aŭ versaĵojn de Walt Whitman, patro de modernaj „liberaj versoj”, aŭ versojn el la plej moderna poezio nacilingva en Eŭropo kaj aliloke.

Devas naskiĝi Esperanto-poeto, kiu ne plu kalkulados silabojn, ne plu haketados vortfinaĵojn por akiri rimojn, kiu povos konsterni kaj agiti, plorigi kaj ridigi nin, kiu povos konfesi sian amon, kiel neniu povis antaŭ li, kiu priskribos la naturon, kiel neniu povis priskribi antaŭe, kiu malkaŝos sentimontojn ankoraŭ ne esprimitajn. Naskiĝu poeto esperantista, kiu frakasos poetajn formojn heredi-

tajn de naciaj literaturoj kaj kreos sian propran en la spirito de la Internacia Lingvo.

La dua demando. Kial verki en lernita lingvo, kial ne en la gepatra? Mi kolektis kelkajn kaŭzojn, per kiuj mi klopodos klarigi, kial poeto rajtas kaj povas verki poemojn en Esperanto.

Dum la mezepoko (kaj ankaŭ poste) multaj poetoj de Eŭropo verkis en la tiama internacia lingvo: latine, ĉar tio, pro politikaj, ekonomiaj, kulturaj kaj aliaj kaŭzoj, fariĝis kutimo, modo; ĉar tiel poetoj povis sin rigardi Eŭropanoj; ĉar ili trovis pli multe da esprimebleco, ol en siaj gepatraj lingvoj. La latina lingvo, mi opinias, ne aperis pli natura al la iama poeto ol Esperanto al la nuntempa. Se la latina lingvo helpis la mezepokan poeton rigardi sin Eŭropano, Esperanto certe donas al la poeto la senton de internacieco. Krome la direndo ofte povas konceptiĝi en la fleksebla artefarita Esperanto pli facile, pli precize, ol en multaj naciaj lingvoj.

Por flavbekula poeto estas pli facile karierumi per lingvo kun malmultaj poeziaj tradicioj, ol per la gepatra lingvo, en kiu jam preskaŭ ĉio estas esprimita, kion oni povis senti kaj elpensi. Kaj en la nacilingvaj literaturoj la „postenoj” estas jam okupitaj kaj zorgoplene gardataj. La terenoj en Esperanto estas senfinaj.

Ĉiu esperantisto estas kreanto de lingvaj elementoj, kiam oni kreas vortojn, esprimojn antaŭe ne aŭditajn, eventuale ankoraŭ tute ne uzitajn. Ekzemple mi la unuan fojon uzis la vorton „karierumi”. Ĉi tiu vorto estas komprenebla por la leganto, kvankam tiu versaĵe ne ekzistis pli frue. Ni imagu, kiajn miraklojn denaska Esperanto-poeto povus, povos fari per nia fleksiĝema lingvo. Kiel granda defio!

En la mondo, fariĝanta pli kaj pli malgranda, pli kaj pli internaciece pensanta, sentanta poeto povos ĉerpi multege el la trezorejo de la Internacia Lingvo.

Kion mi povas aldoni al la diritaj? Mi admonas Esperanto-poetojn citante kelkajn versojn el la poemo „La poetoj de la XIX. centjaro” de la plej granda poeto de la hungaroj, Petőfi, en la traduko de K. Kalocsay:

*Facilanime sin neniu
dediĉu al surkorda lud':
tre gravan taskon entreprenas,
kiu nun tuŝas al liut'.
Se vi kapablas sole kanti
pri l'propraj ĝojo kaj dolor'
ja vin la mondo ne bezonas,
la sanktan lignon metu for!*

GÁBOR VIGH



WILLIAM AULD

BONVOLO SUFIĈAS?

Si venis verŝi mian viskion.
Dum dudek minutoj ni konversaciis,
ŝi japane, mi angle.
La japanan mi ne komprenas,
ŝi la anglan ne komprenas.
Ni multe spritis, ridis,
kubutis familiare unu la alian.
Sed kompreneble
ni tediĝis fine
pri l' vojo kondukanta nenien.
Mi ofte scivolas:
kion ŝi efektive diris al mi?

EDWIN DE KOCK

SONETO

Mi nun memoras ŝin, post dudek jaroj
bela ankoraŭ. Somertag, perfekta
per la mortintaj birdoj, abelfaroj
kaj parfumbunto — prao sendifekta.

Arbaroj, urboj estis dishakataj,
forvelis multaj nuboj el memoro,
ĉio disfluas per jaroj senkompataj,
kaj homoj kadukiĝis en la koro.

Tamen la pensoj estas sorĉomondo
kaj Mirinduj' la vorta kontinent'.
Anstataŭ temp' eterno. Ŝvela florondo
ne krevas, Ĉio elekta permanent'.

La homoj per imagintenso vivas
al kiu mort' 'stas ŝajno, ŝanĝ' fiktivas.

LUDMILA JEVSEJEVA


AL TÁRKONY

Ĉe via foto, Lali Blond,
Aromas blanka hiacinto.
Kun ruĝiĝinta nazopinto
(ĉu pro ekscito, aŭ ekstaz')
Mi sekcas la poetan plumon,
Kaj en profilo kaj en face.
Envia koron pintas sento.
Ĝin kaŭzas brila „Okcidento”.

Solecotemon, per la man'
Artista, Vi ektuŝas ofte.
Ĉe kara tombo larmas softe.
Ĉu sub cipresa branĉo-trem',
Ĉekapa kruc', sur altaĵeto,
Solveiĝas vivo-teorem'?

„Soifo”-n legas mi, relegas
De paĝ' al paĝo. KREDU min,
Kor' ardplezuras ĝis kulmin',
kaj se horloĝo kukolkrie,
Ekzilas min el sorĉa mondo,
Mi diras, Lali Blond, defie:
Omnia tua mecum porto.

Maljuna muzikilo — grafikaĵo de
Károly Kirchmayer



Prepariĝo al la Budapeŝta Foiro

Laŭ la programo de la HUNGEXPO, novnome Budapeŝta Internacia Foirocentro, la printempa Budapeŝta Internacia Foiro (BNV) malfermiĝis la 18-an de Majo unufoje sur sia nova areo, en la X-a distrikto, Kőbánya. Ĝia areo ĝisnuna en la Urba Bosko fariĝis nova ripozejo de la budapeŝtanoj. En la renovigitan foiron anoncis sin ekspoziciistoj el 21 landoj, tiel ke krom la disponeblaj 51 mil kvadratmetroj necesos ankoraŭ pluaj 10 mil. — En 1974 oni festas la 25-an datrevenon de la fondo de l'Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpe (KREH — KGST). Tial la varoj de la KREH-landoj okupos la kvaronon de la tuta areo. Krome, la internacia foiro estis specialigita. Ĉiuj pavilonoj estas klimatizitaj. Oni daŭrigas la konstruadon por plivastigi la eblojn de internaciaj renkontiĝoj, kreante ekz-e kongresan ejon.

Helpe de HUNGEXPO la hungaraj entreprenoj povis partopreni en 1974 en 29 landoj 58 ekspoziciojn sur 35 mil kvadratmetroj da areo entute.

o o o

Ĉi-jare la hungara Etnografia Muzeo ricevos novan hejmon: ĝi transloĝiĝos en la konstruaĵon de la Hungara Nacia Galerio, kiu lasta ricevos por si lokon en la iama reĝa kastelo de Budaburgo. En la Etnografia Muzeo troviĝos — krom kelkaj periodaj — konstanta ekspozicio, resumanta la bildon de la mondo antaŭa al la industria civilizacio. En la periodaj ekspozicioj oni povas prezenti per unu fojo nur 5—6 procentojn de la grandega kolekto. Oni projektas ankaŭ enkonduki liveradojn, per kiuj la muzeo fariĝos kultura centro pri muziko kaj filmo. Nome, ĝi konservas grandnombran kolekton de popol-kantoj notitaj de Béla Bartók, Zoltán Kodály, Béla Vikár, László Lajta, krome ĉ. 200 mil fotojn, 80 mil metrojn da magnetofonaj bendoj, 2 milionojn da paĝoj de arkaikaj notoj. En la nova hejmo oni povos prezenti la tekstaj-kolekton el ĉ 40 mil pecoj, la plej grandan en ĝia speco en la mondo.

o o o

La Usona semajna gazeto TIME klasifikis el la pasintjare prezentitaj filmoj inter la plej bonajn kreaĵojn la hungaran filmon „Amo”, reĝisoritan de Károly Makl laŭ du noveloj de Tibor Déry.

o o o

Volumo de Petőfi-poemoj aperis en Meksiko; ĝi enhavas 40 poemojn en la hispana lingvo kun 30 ilustraĵoj. La belaspekta eldonaĵo povis aperi dank al la helpe de hungar-devenaj meksikanoj.

o o o

Multaj esperantistoj konas certe la satiran novelon de Sándor Szathmári: „Perfekta civitano”. El la novelo Balázs Vargha faris libreton por burleska oper-verketo kaj ĉi tiun, kun la muziko de F. Hidas, dissendis la hungara televido.

En la Profesor-edukaj Institutoj de la urboj Pécs kaj Szeged jam de 25 jaroj oni edukas gimnaziajn profesorojn por la naciaj minoritatoj. Okaze de la jubileo, la du ĉeflernejoj aranĝis kunvenon en Pécs. Dum la lasta kvaron-jarcento oni distribuis 650 diplomojn en la fakoj germana, rumana, slovakaj kaj sudslava. Tiuj diplomitaj pedagogoj ne sole instruas en lernejoj, sed krom tio ili plenumas ŝlosilan rolon en la komuna kulturo de la naciaj kolonioj. Ekde la 1968-jara partia rezolucio la kultura vivo de la hungariaj naciaj minoritatoj grave plifortiĝis, ilia situacio koncerne instruadon kaj kulturon konsiderinde pliboniĝis.

o o o

Erika Pogány, el la hungara urbo Emőd, kiu unufoje, en 1972, jam gajnis premion en la internacia konkurso de infandeseĝnaĵoj tenita en Hindunio, en 1973, denove estis distingita, nun jam per la Nehru-memormedalo Dume ŝi jam finis la ok-klasan bazlernejon. Cetere, ŝi estas jam la dua knabino el Emőd, kiu sukcese partoprenis la Hindunian internacian konkurson pri infandeseĝnaĵoj. Pri ili ambaŭ okupiĝis la pedagogino Béla(edza) Lukács.

o o o

Kreskanta intereso montriĝas en Pollando pri la hungara lingvo. Antaŭ nelonge la Varsovia eldonejo Wiedza Powszechna aperigis el la plumo de Eugeniusz Mroczko hungaran konversacio-libron en 50 mil, lernolibron de la hungara lingvo por komencantoj en 30 mil, kaj hungaran priskriban gramatikon en 20 mil ekzempleroj. El ili la konversacia libreto aperis sesfoje dum la lastaj ses jaroj. Prof. E Mroczko jam de du jardekoj instruas la hungaran lingvon, kaj de jaro al jaro plurobligas la superanonciĝantoj en la kursoj. Koncerne la oficialajn cirkonstancojn de la instruado: de post 1952 pli ol 50 studentoj ricevis en Varsovio instruodiplomon pri la hungara lingvo. En Krakovo la nunan lektoradon oni transformos filologia katedro. En la instruomaterialo de la Katowice-a Zawadzki-liceo la hungara lingvo estas la dua lingvo. Nia lingvo estas elektelebla por bazlerneĵanoj en Varsovio kaj Tarnow. En marto 1974 la Varsovia Hungara Kulturinstituto aranĝis hungaran literaturan tagon. Ĉirkaŭ 30 verkistoj, poetoj, tradukartistoj partoprenis la unuan landan konferencon pri hungara beletristiko. — Kaj plifortiĝas la turismo inter la polo kaj ni: ekde la 60-aj jaroj 5 milionoj da poloj turistis en nia lando, dum el ni po 100 mil ekskursantoj vojaĝas jare precipe al la montaro Tatra.

o o o

panoramo

En marto kaj aprilo de 1974 la Hung. Ŝtata Koncert-Orkestro faris rondvojaĝon en la Ekstrema Oriento. Dum ĝia 40-taga turneo en Japanio, Australio kaj Singapuro ĝi prezentis 12 koncertojn en Tokio kaj Osaka, poste 14 koncertojn en la Australiaj urboj Perth, Adelaide, Melbourne, Canberra, Sidney kaj Brisbane, fine du koncertojn en Singapuro. De la ekiro ĝis la hejmenveno la orkestro traveturis 50 000 km-ojn, kio estis ne malgranda ŝarĝo.

Nian ensemblon atendis nekutime granda interesiĝo kaj rekompencis granda sukceso, evidente dank' al tio, ke la orkestro konigis komponaĵojn de Europaj komponistoj: Weber, Beethoven, Mozart, Brahms, Vivaldi, kaj speciale la muzikverkojn de Bartók kaj Kodály, kiuj en ĝia prezentado sonis kvazaŭ en gepatra muziklingvo. La muzikestroj estis János Ferencsik kaj Ervin Lukács. „Ni povas senti, ke pli kaj pli ni estas rekonataj partoprenantoj de la monda muziko-kulturo” — diris J. Ferencsik, la ĉefdirektoro de la koncert-orkestro.

o o o



Preĝejo en vilaĝo Vörösberény — foto de Tamás Mihalik

Krom la var-interŝanĝo, kiu konstante pligrandiĝas, en la lastaj jaroj mondrilate kreskis la interesiĝo ankaŭ pri niaj intelektaj produktaĵoj. La Buroo de Internacia Kunlaboro Teknika-Scienca (TESCO) ĉi-jare duobligas siajn interrilatojn. Tiu eksporto direktiĝas precipe al socialismaj landoj: GDR, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio. Por la Vjetnama Dem. Respubliko hungaraj fakuloj planas loĝkvartalojn, ripozdomojn ktp. En la ĉefurboj de la socialismaj landoj oni estigas kontorojn de scienca-teknika kunlaborado por trovi, eĉ evoluigi eksportebilaĵojn. Ankaŭ kun la kapitalismaj kaj evoluantaj landoj TESCO larĝiĝas de jaro al jaro siajn interrilatojn, ekz-e kun GFR, Austrio, Alĝerio, Nigerlando; ĉi tiuj jam apartenas al nia tradicia partneraro. Nova merkato de la entrepreno estas Irako kaj Greklando.

o o o

Cevalaro en montaro de Bükk, ĉe vilaĝo Csipkésút — foto de Károly Gink



Diplomatoj de la hungara kulturo kaj scienco

En tri socialismaj landoj (*Pollando, Germana Demokratia Respubliko, Bulgario*) kaj en tri okcidentaj landoj (*Italujo, Francujo, Aŭstrio*) funkcias hungara instituto. Similaj kulturcentroj ekzistis jam antaŭ la dua mondmilito en la metropoloj *Vieno, Romo, Parizo* kaj *Berlino*. Escepte la instituton en la iama imperia Berlino, la aliaj daŭrigis sian laboron ankaŭ post la dua mondmilito, konforme al la ŝanĝiginta politika situacio. Krome, estis fonditaj novaj institutoj en *Sofio* kaj *Varsovio* ambaŭ en 1948 kaj en la ĉefurbo de GDR, en *Berlino* (1970).

La agadkondiĉojn ebligas al tiuj hungaraj institutoj interŝtataj kulturaj kaj sciencaj kontraktoj, plue, duflankaj interkonsentoj. La fakajn kaj personajn kondiĉojn prizorgas la *Instituto por kulturaj rilatoj* (Budapeŝto) kaj la hungara *Ministerio de eksterlandaj aferoj*.

Baza tasko de la institutoj estas efike helpi la konigon de la hungaraj kulturaj kaj sciencaj rezultoj, prezenti la elstarajn kreaĵojn de nia kulturo, bel- kaj muzikartoj, literaturo, kontribui al tio, ke la eksterlandaj interesigantoj ricevu realan bildon pri la socia, kultura kaj scienca vivo de la socialismon konstruanta Hungarlando.

La scienca kaj teknika kunlaborado tutmonde pli kaj pli vigliĝas, grava kondiĉo estas do certigi konvenajn informaciojn por ambaŭ partioj. En ties servo la institutoj serĉas la terenojn komuninteresajn, kunvenigas la partnerojn, kiuj havas similajn temojn, partoprenas en la preparado de kontrakto pri scienca-teknika kunlaborado.

La institutoj kiel kultur- kaj propagandaj centroj, estas destinitaj alvoki la interesiĝon pri nia patrio, doni klarigojn al organoj, institucioj kaj privatuloj turnantaj sin al ili. En la institutoj konataj scienculoj kaj artistoj tenas regule prelegadojn; oni aranĝas tie ekspoziciojn, koncertojn; la bibliotekoj estas je dispono de ĉiuj, kiuj lernas la hungaran lingvon aŭ interesiĝas pri la hungara beletro, artoj, scienco.

Favoraj cirkonstancoj helpas la laboron de niaj institutoj en la socialismaj landoj. Nome, ilian agadon subtenas ne nur la oficialaj organoj, instancoj, sed ankaŭ la senantaŭjuĝa simpatio de popolo de amikaj landoj. Tio helpas pliprofundigi la recipokan ekkonon kaj amikecon. Niaj institutoj havas arĝan kontakton kun la publiko; kreskas la nombro de la konstantaj vizitantoj kaj de tiuj, kiuj funde konas la hungaran kulturon. La kontaktoj, krom kun la intelektularo, ĉiam pli kaj pli ofte firmiĝas kun la granduzina laboristaro kaj la junularo.

Al la pli signifaj rezultoj apartenas la literatura progapando: la literaturaj vesperoj, konkursoj, organizo de la gravaj datrevenoj. Grandan sukceson havis ekzemple la sinprezento de junaj artistoj en

Sofio, grafika ekspozicio en Varsovio kaj ceramika ekspozicio en Berlino. Same sukcesis la filmprezentadoj, lige kun verkistaj diskutoj en la tri ĉefurboj.

Grava tasko de la institutoj, kiuj agadas en la kapitalismaj landoj, estas en la koncerna lando transformi la ofte falsajn, unuflankajn opiniojn pri nia patrio, vivo kaj progreso. Bedaŭrinde ni renkontas ankaŭ malbonintencajn disfamigojn kontraŭ ni. Por ekvilibri tion, niaj institutoj klopodas disvolvi sian agadon inter homoj, kiuj simpatias kun ni, estas almenaŭ lojalaj al nia lando kaj interesiĝas pri niaj rezultoj. La aranĝaĵojn vizitas prefere intelektuloj, universitataj pedagogoj, fakuloj, reprezentantoj de la kultura kaj literatura vivo. Inter la formoj de la kultura progapando troviĝas pli grandaj aranĝaĵserioj, hungaraj semajnoj, kies repertuaro enhavas debutojn de hungaraj filmoj, koncertojn, gastroladojn, krome ekspoziciojn, teknikajn tagojn, sciencajn prelegadojn, eventuale komercajn aranĝaĵojn. En la proksima pasejo oni aranĝis hungarajn semajnojn en la francaj urboj *Poitiers* kaj *Bordeaux*, italaj urboj *Alessandria, Urbino* kaj *Livorno*, poste en la aŭstria *Linz*. En *Bordeaux* rolis la baletensemblo de la Budapeŝta Operdomo, oni aranĝis ankaŭ ekspoziciojn, muzikprogramojn, teknikajn konferencojn.

Pliboniĝas niaj interrilatoj kun la eldonistoj, arttradukistoj, revuoj. Ekz. en la jubilea jaro de nia poeto Sándor Petőfi la franca revuo „*Europe*” aperigis apartan numeron. Disvastigon de la hungara muzikkulturo celas la koncertoj aranĝitaj de la institutoj. En *Parizo* kaj *Romo* jam de jaroj ricevas podion niaj junaj muzikartistoj. Granda estas la interesiĝo pri la metodoj de la hungara muzikpedagogio, instruadreformo, jura normigo, pri niaj film-, muzikartaj rezultoj. Tiujn pretendojn oni kontentigas ĝenerale per prelegoj de invititaj hungaraj scienculoj kaj fakspertuloj.

En la menciitaj tri kapitalismaj landoj vivas proksimume cent miloj da hungaroj, inter ili multaj elmigrantoj, kiuj forlasis la landon antaŭ jardekoj, sed konservis sian gepatran lingvon. Signifa parto de hungaroj vivantaj eksterlande observas kun interesiĝo kaj simpatio la socialisman evoluon de nia patrujo kaj volonte vizitas ankaŭ la programojn de la institutoj. Ekz. en *Vieno* ili estas konstantaj vizitantoj de la aranĝaĵoj de „*Collegium Hungaricum*”. Sed ankaŭ aliloke oni povas ofte kalkuli ĉe la diversaj programoj je aktiva partopreno de hungardevenaj progresemaj intelektuloj, artistoj kaj scienculoj, kiuj ludas gravan rolon en la kultura kaj scienca vivo ankaŭ de sia nuna lando.



György Lehel, muzikestro

HUNGARAJ ORKESTROJ EN AMERIKO

En la lastaj jaroj plurfoje vizitis Amerikon grandaj hungaraj orkestroj.

En 1971 unue la Simfonia Orkestro de Hungara Radio kaj Televido, eksterlande konata sub nomo: *Budapest Symphony Orchestra*, faris unumonatan koncertvojaĝon en Usono, koncertante eĉ en tiaj lokoj, kie ĝi estis la unua Eŭropa ensemblo. (Pri tiu turneo aperis sciigo en H.V. 1972/2 p. 20.)

La impresoj, kiun la orkestro faris, estis tiel profunda, la eĥo tiom bona, ke vekigis granda intereso pri hungaraj orkestroj.

En 1972 *Allami Hangverseny Zenekar*, Ŝtata Koncert-orkestro estis jam atendata kun granda scivolo, kiun ĝi kun simila sukceso kontentigis, — kaj en 1973 denove la *Budapeŝta Simfonia Orkestro* vizitis *Usonon* kaj ĉi-okaze ankaŭ *Kanadon*. Pri tiu lasta, kiel freŝa okazaĵo ni raportas iom pli detale.

Inter 1973. 10. 30. kaj 12. 14 pasigis la pli ol centmembra ensemblo eventoriĉajn kvardek ses tagojn en Nordameriko, prezentante 35 koncertojn en diversaj urboj, kelkfoje eĉ du en la sama loko. Ili ofte de tago al tago veturis po 500—600 km-ojn de unu urbo al alia; post alveno sekvis akustika provo kaj vespere la koncerto.

— Ĉu en nordaj ŝtatoj ĉu en sudaj — rakontas G. P. unu el la orkestranoj — ni spertis ĉie viglan interesigon, kiu forgesigis al ni la tiutagajn centkilometrojn. En *Raleigh (North Carolina)* pasigante tri tagojn, ni ĝuis veran someran veteron meze de novembro (ja 10 gradojn pli sude ol Budapeŝto), eĉ, la pli juna parto de la membraro ludis futbalon inter du koncerto-tagoj. La interesigo de la loĝantaro (ne pri la futbalmatĉo, sed pri la

koncertoj!) superis ĉion ĝisnunan. En du vesperoj ni prezentis la saman programon en la sporthalego — tio estis nome la plej granda ejo en la urbo — kie krom invititaj honoraj gastoj ĉeestis 8000, resp. 6000 aŭskultantoj. — En *Detroit* por ni hungaraj interesa vidaĵo estis la multaj negroj en la aŭskultantaro, kiuj same entuziasme aŭskultis nian programon. — Alterne ni ludis post grandaj — en malgrandaj koncertejoj kun mirinda akustiko (komprenu: „malgranda” kun 2—3 mil sidlokoj!), — alterne: post Sudo en la Nordo, aŭ en Kanado, kie, precipe en *Hamilton* kaj *Toronto*, la ebleco vidi la *Niagaron* almenaŭ tiom interesis nin, kiel la koncertejoj.

Notinde, ke kelkaj el niaj programaroj ne estis facile kompreneblaj por muzike mezkleraj. Ni prezentis preskaŭ en ĉiu programo ankaŭ ĉi-jarcentajn verkojn. Ekzemple: „*Mathis, der Mahler*” Mathis, la pentristo, de *Hindemith*, — aŭ de *Bartók*: „*Concerto*” kaj la „*Muziko por kord- kaj perkutinstrumentoj* kaj celesto*”, krome lian *III. Fortepiano-konĉerton*, kiun lastan prezentis la juna artisto Gyula Kiss kun simile granda efiko, kiel la A-majoran fortepiankonĉerton de la alia granda hungara majstro: *Liszt*. — Aparte notinda estas la ultramoderna kompozicio de la hungara *András Szöllösy*: *Musica per orchestra*. Pri tiu verko notindas, ke ĝia unua (pra-) prezentado okazis en nia interpretado en *Vieno* (09.26), la dua du tagojn poste en *Budapeŝto*, — kaj la tria (11.26) jam en Ameriko, en *Milwaukee (W. Wisconsin)*. Tian ŝancon oni devus ebligi por ĉiu promesplena nova komponaĵo, eĉ se oni ne povas aŭguri, ĉu ĝi estos granda sukceso aŭ fiasko. Ni spertis, ke la pliparte konservativa Amerika publiko ne volonte akceptas la modernajn muzikpecojn, sed ĝi tamen ne jam anticipe, principe

rifuzas ilin. En pluraj lokoj vigla aplaŭdado atestis, ke multaj plaĉe aŭdis ĉi tiun verkon, kaj inter profesiaj muzikistoj ĝi estis altetaksata.

Krom la menciitaj plej modernaj verkoj kompreneble grandan ovacion rikoltis la konataj programeroj de grandaj majstroj: *Debussy*, *De Falla*, *Weber*, *Rossini*, *C. Franck*, ktp.

En la gazetaro aperis multaj artikoloj pri la Budapeŝtaj Simfoniistoj, la dirigentoj kaj solistoj. Jen kelkaj: En *Providence*, la ĉefurbo de *Rhode Island* la fama kritikisto *Edwin Safford* skribas: „Kompare kun *Philadelphia Orchestra Cadillac* la ludo de B. Simf. Ork. ŝajnas eble iom pli seka ol la brilo de la unua, sed ĝuste tial duoble tiom interesa. Kaj kio estas precipe pli grava: ĝuste tiaspeca sonado povis esti la celo de la orkestro. La dirigento *György Lehel* povus transpreni kun senduba sukceso la gvidon de iu ajn granda Amerika orkestro...

Pri la *Vaŝingtona* koncerto en *Kennedy Center* skribas *Devid B. Kozinski* en *Evening Journal*: „... La Budapeŝtaj Simfoniistoj konkuras kun la plej bonaj orkestroj de la mondo. *Géza Oberfrank*, la energia dua dirigento direktis eminente sian programon. La Violonkonĉerto de *Čajkovski* prezentita de *András Kiss* atestis, ke li estas eminenta artisto. La poezieco de la *Canzonetta* kaptis ĉiun.

Kiel antaŭ du jaroj, ankaŭ nun oni juĝis sensacia la ludon de *Ferenc Tarján* (II. Kornkonĉerto de *R. Strauss*), nomante lin la plej granda ĉaskorn-artisto de la mondo.

La lasta koncerto en *Carnegie Hall* en Novjorko estis neforgesebla ankaŭ por la orkestro, kiu, konigante la hungaran muzikarton, multe laboris dum lacigaj ses semajnoj, sed riĉa de multaj eventoj adiaŭis la „novan kontinenton”.

Alfonso Pechan

* frap-instrumentoj



BELOIANNISZ HÍRADÁSTECHNIKAI GYÁR

Telekomunikada Fabriko Beloiannis pretigas en ĉiu grandeco kaj por ĉiu destino aŭtomatajn telefoncentralojn, bezonatajn al la telefonretoj. Tiujn centralojn ĝi liveras kune kun ĉiuj apartenaĵoj, instalas ilin kaj funkci-pretaj transdonas al la mendintoj. La entrepreno, evoluinta el malgranda uzino fondita en 1874, fieras pri tio, ke la telefoncentraloj uzitaj, aŭ nun uzataj en Hungario preskaŭ senescepte pretiĝis tie ĉi.

La historio de la fabriko estas kunligita kun la evoluo de telekomunikado en Hungario. La prauzino de BHG estas la — en j. 1887, de Bernardo Egger fondita — „Uzino por Telegraf-instalado, Fabrikado kaj Vendado”.

Por fabrikado de telefon-instalaĵoj en Hungario inter la unuaj kunlaboris ankaŭ la firmao Egger. En 1887 Gábor Baross, kiu iĝis poste ministro pri komerco, nomumis organizan komisionon, kiu trovis taŭga kaj tial elektis la kompanion B. Egger por konstrui la telefoncentralon en *Temesvár* (nun urbo Timiŝoara en Rumanio). Eble en tiu tempo komenciĝis en nia patrujo kaj tutmonde la konkuro inter la telefonpretenduloj kaj inter la eblaĵoj — kontentigi tiujn en la telefona reto. En 1900 oni jam pretiĝis en Budapeŝto telefon-centralon por 15 000 linioj. La manipulaĵ centraloj pretiĝis ankaŭ por eksporto, ĉefe por Rumanio, Serbio kaj Turkio. En 1897 la familia akcia societo Egger kuniĝis kun „*Egyesült Villamosági RT*” (Unuiĝinta Elektra Akcia Societo) el kiu ĝi eliĝis en 1928 kaj evoluiĝis grandioza entrepreno sub nomo „*STANDARD VILLOMOSSÁGI RT*” (Elektra Akcia Societo Standard). Post 1945 kaŭzis multan zorgon, ke la dokumentadoj de I.T.T. jam delonge nur malorde, aŭ tute ne alvenis. Post la ŝtatigo, la 28-an de decembro 1949, la fabriko organizis sian memstaran evoluigan avangardon el siaj teknikaj ekspertoj. Inter pli favoraj cirkonstancoj sur novaj vojoj, kun freŝaj fortoj ili paŝotenis kun la kontinue kreskanta evoluo. Tio alportis plenan sukceson.

Dum la ampleksigo de la enlanda telefonreto ĉiujare pli kaj pli multaj BHG-instalaĵoj estas ekfunkciigataj, inter ili aŭtomataj, interurbaj telefoncentraloj. Pere de tiuj — jam de jaroj — rekte povas ciferdiski unu la alian la Budapeŝtaj kaj provincaj telefonabonantoj.

Paŝoteni kun la evoluo: tio gvidis la fabrikon BHG, kiam ĝi laŭgrade transprenis la modernan krosbar-

teknikon. En mondaj rilatoj oni konstruas laŭ krosbar-tekniko multe pli ol la duonon de la aŭtomataj telefoncentraloj, — en BHG pli ol 90%-ojn.

Granda sortimento estas je la dispono de la interesiĝantoj. Inter la modernaj instalaĵoj evoluigitaj fare de la inĝenieroj de BHG unuavice estas menciinda la subcentral-familio de tipo CA, kies ŝalt-maŝino, la ĝemelponta krosbar-maŝino, estas hungara patento. Por la fabrikado de centraloj — kun pli malmultaj linioj — la inĝenieroj de la fabriko evoluigis la subcentral-familion de tipo RA, en kiu ili utiligis nur relajsojn kiel kluĉelementon, nome fadenrisortajn relajsojn (ankaŭ hungara konstruaĵo protektita per patento).

La plej malgranda membro de la CA resp. RA subcentral-familioj havas 6, la plej granda 2000 liniojn.

Inter tiuj limoj BHG povas liveri sep diversajn tipojn.

Estas prilaborita kaj efektivigita la domcentralo CH—100—2000 (PAX), kiu pretiĝis por domaj interrilatoj sen ĉeflinio. Ĝi estas konvena por estigi reton de plurcentrala funkcionado, kaj uzebla por ciferdiskaj aŭ ciferklavaj aparatoj. La tipo EH 10—20 plene elektronika doma centralo estis anoncita por foira premio.

Krom la enkonduko de la krosbar-tekniko estas signifplena evolua rezultato de la entrepreno la enhejmigo de la elektrona tekniko. Pri tio atestas la membroj de fabrikaĵ-familio ECR, kiuj enhavas la centralojn kun elektrona direktado.


Ĉiloke ni akcentas, ke la pretendojn de la Hungara Poŝto la entrepreno priatentas kaj ĝi klopodas vaste kontentigi tiujn konforme al ĝiaj mendoj.

La entrepreno BHG elstare partoprenas en la konstruado de la enlanda granddistanca telefonsistemo kaj en la aŭtomatiza programo de provinco.

Inter la instalaĵoj havas eminentan lokon la vilaĝa krosbar rurala centralo de tipo ATSK (Aŭtomata Telefona Stacio Koordinata), kiun la soveta Esplorinstituto de Poŝto en Leningrad ellaboris kaj hungaraj evoluiĝantoj enhejmigis. Tiu instalaĵtipo pretiĝas por 100—2000 linioj. La kluĉ-elementoj de la centralo estas relajsoj de tipo „S”, kaj la krosbara kluĉmaŝino laŭ soveta patento. La sistemo estas ampleksigebla per laŭgrada relajsa regado po 100-liniaj paŝoj. Inter la kadroj de la teknika kunlaboro de *Sveda LM Ericsson* kaj BHG estas konstruataj la AR-tipaj krosbar-sistemaj vilaĝaj kaj urbaj publikaj telefon-centraloj por estigo de grandurbaj retoj kaj aŭtomataj interlokaj centraloj kun longdistanca telefonado.

En 1974 festas sian centjaran jubileon la Telekomunikada Fabriko Beloiannis, kiun el la tiutempa etuzino — okupiganta nur kelkajn laboristojn — evoluis je plej granda fabriko de telefon-subcentraloj en Mez-eŭropo.

Ĝi plu restas signifa faktoro en la plivastigo de la bona famo de la hungara telekomunikada tekniko.



REVUO DE REVUOJ

SCIENCA REVUO ĝojinde solidiĝis tiom, ke ekde 1971 ĝi aperas jare sesfoje sur po 32 paĝoj. En la numero 1973/6 oni trovas artikolon de B. Popoviĉ pri lingva egalrajteco, „unu el la forgesitaj homaj rajtoj”, el scienca vidpunkto. Li konstatas, ke UNESKO kaj UN ne serĉas la solvon de la problemoj kaj ke tiu solvo ne povas esti alia ol lingvo neŭtrala. — W. E. Klimek el Pollando okupiĝas pri tio, kiom la nuklea tekniko estas danĝera kiel naturmalpuriga faktoro. Li konkludas, ke ĝia danĝero estas pli malgranda, ol tiu de aliaj branĉoj de la tekniko anstataŭigataj per tekniko nuklea. La facileco malkovri etajn kvantojn de radioaktivaj substancoj kaj la videbla zorgemo de esploristoj kaj ŝtataj oficejoj prirespondaj, garantias pli bonan protekton de la natura medio kontraŭ ili ol kontraŭ aliaj tekniko-branĉoj. — Lima Melo el Brazilo resumas la esplorojn pri tio, kial la tumoroj kreskas, t.e. kiel estiĝas la kancero. La temo kaj ĝia pritrakto estas interesaj, sed la troa koncizeco postulas tenacan atenton. Grandan valoron donas al la du lastaj artikoloj la granda nombro de referencoj (154. resp. 53 titoloj). — H. G. Wannemakers kaj Maastricht atentigas pri la granda utilo, kiun la esperantologio povas havi per akiro de fotokopioj pri gravaj dokumentoj kaj literaturaĵoj.

En la KOMUNA ESPERANTO GAZETO ankaŭ nun (II/1974), kiel ĉiam, estas interesa la artikolo de S. Aarse: La spegulo de E-o, montranta, kiel multaj idoj en la latinidaj lingvoj devenis de la radikoj *tend*, *kap*, *kapt*. En la KUNE-parto aperis en traduko du prireligiaj artikoloj, kiuj min iom mirigis, ĉar mi ne povis ne senti en ili kelkan ironion.

En THE WORKER ESPERANTIST mi kutime serĉas antaŭ ĉio la antaŭlastan kovril-paĝon, kie troviĝadas lingva angulo de W. Prent. Ankaŭ nun (II, 1974) mi trovis la kontribuojn, sed nun ĝia lasta alineo min surprizis, preskaŭ konsternis. Ĉu la artikolanto ne rimarkis, ke en tiu sciencfikcia novelo troviĝas *eŭfemismoj* trudataj de subprema reĝimo, do „elkora apogado” ne estas prenebla laŭvorte, sed signifas punon. Min afliktis tia manko de senso de humoro.

Ĝis nun mi ne havis okazon vidi kaj revui la junularan revuon KONTAKTO; nun jen estas antaŭ mi tri ĝiaj numeroj kaj plaĉe mi rigardadas ilin, allogajn aspektojn kaj amplekse. Certe granda ĝojo kaj espero estas, ke nia junularo volas kaj povas vivteni tian revuon; ĝi estas organo de TEJO. La revuo multe okupiĝas pri kriaŭtaj problemoj de nia mondo: poluado de la naturo, danĝero de urbaniĝado, genocidoj, sorto de indianoj, situacio en la evoluantaj landoj. Speciale interesis min la artikolo „Kanguruo lernas salti” koniganta la radike ŝanĝeman politikon de la aŭstrala ĉefministro G. Whitlam, kiu kun sia „senbrida kaj sendistinga impeto”, larĝigos la horizontojn, kiuj, el la kulpo de la industriistoj kaj sindikatestroj, restis ĝis nun tiel striktaj. Estas kompreneble, ke temas en la revuo ankaŭ pri dulingveco, pri interlukto de lingvoj kaj ties sekvoj, pri la „analfabeta globo” ktp. Interesa informo: Kadhafi, prezidento de Libio, postulas, ke la pasportoj de la landvizitantoj estu presitaj en la araba; Sovetunio es-

tas preta por tio, kondiĉe ke la pasportoj de libianoj estos presitaj en ĉiuj 16 oficialaj lingvoj de Sovetunio. Malplej plaĉis al mi la traduko de la festparolado, kiun E. Ionesko faris okaze de la Salzburga Festivalo. Lian analizon de la nuna monda situacio la revuo mem komentas kiel provokan kaj profunde pesimisman, kaj nomas la aŭtoron „olda kolera homo”. Detale analizi kaj refuti la paroladon mi ne povas inter miaj kadroj (ĝi bezonus apartan artikolon), mi rimarkas nur, ke Ionesko ŝajne batas kaj dekstren kaj maldekstren, sed esence li estas akre kontraŭ-socialisma. Li diras: „kiam revolucio ekestablis sin, ĝi pensas pri puno, repago kaj revenĝo”. Mi respondas nur: vidu Ĉilion. En sia kontraŭ-progresismo li kondamnas ĉiujn revoluciojn de la pasintaj 200 jaroj, do li resopiras la mezepokan feŭdalismon kun ties ŝtiparoj kaj sorĉistinoj-procesoj.

En la UEA-revuo ESPERANTO (I. 1974) ni vidas tiolpaĝe du tostantojn: ĉinon kaj japanon. La tosto okazis en Tokio, kie la Japana E-a Instituto akceptis delegacion de Ĉina E-Ligo. — Interne ni povas legi longan artikolon de la japano Kurisu Kei pri la nuna pozicio de la Internacia Lingvo en Ĉinio. Li mencias, ke en Ĉinujo aperas E-aj tradukoj de la verkoj de Mao Zedong kaj bela gazeto nomata „El popola Ĉinio”. Poste li citas kaj komentas raportojn de japanoj vojaĝintaj en Ĉinio. La redakcio de Esperanto komentas: „La prezentata artikolo pruvus unu plian fojon, ke la ne-ĉinaj metroj verŝajne grave maltaŭgas mezuri la ĉinajn eventojn inkluzive la tiean E-movadon.” — La gazeto aplaudas al tio, ke en UN du pliaj laborlingvoj, la ĉina kaj araba minacas ne nur per kompleta kaj definitiva „babeliĝo”, sed ankaŭ ŝarĝas la buĝeton per pliaj milionoj da dolaroj. Kaj oni jam scias pri klopoloj akiri oficialan rangon por aliaj lingvoj, tio vekas eĉ aldonan timon en la palaco de UN, kiun la artikolo prave nomas „vitra Babelturo”. La sola savo, Esperanto, kompreneble estas rigardata kiel io neserioza.

La HEROLDO DE ESPERANTO en sia Scienca Supplemento okupiĝas ekskluzive pri la danĝeroj, per kiuj la moderna industrio minacas la eko-sistemojn, la naturan viv-medion: la materialo estas redaktita de A. Fernandez, renoma pro lia sciencpopulariga libro. La faktoj, kiujn la artikoloj prezentas, efektive estas tre minacaj, tamen optimiston ĝuste tio trankviligas iomete, ke la homaro ne kuras blinde en sian pereon, sed scienculoj ne ĉesas ĝin alarmi, alarmi, alarmi kontraŭ la memmortigo. La artikolojn oni devas legi: ekstrakto el ili ne povas tion kompensi. Nur du faktojn mi ellevas: unu estas minomata malsano en Nipono, kiun kaŭzas mangado de fiŝoj vivintaj en akvo venenigita per industrio-devena hidrargo. Konsterne estas, ke la medicinan esploron de la malsano, la malkovron de ĝia origino ĉiel volis malhelpi la industrio, la lokaj magistratoj, kaj la japana registaro publikigis la aferon nur sub premo de movado fare de studentoj kaj junuloj. En tia obskuro tamen, la jugoslavo Marinko Ĝivoje konkludas en sia artikolo, ke la situacio estas ja tre danĝera, sed ne senesperiga. Kiel ekzemplon li mencias Hungarion, kie la ŝtato rigardas sia grava zorgo malpermesi tian aktivecon, kiu danĝere malpurigas la aeron.

Junularo!

La vojaga kontoro de la hungaraj gejunuloj: Junulara kaj Studenta Vojagkontoro EXPRESS ame vokas kaj atendas vin en Hungario!

En niaj komfortaj, modernaj hoteloj, en niaj internaciaj somerumejoj situantaj en bela ĉirkaŭaĵo favorpreze ni certigas al vi agrablan ripozon, refresigon kaj amuzadon.

Niaj junularaj hoteloj:

HOTEL IFJÚSÁG

H 1024 Budapest, II. Zivatar u. 1—3.

HOTEL EXPRESS

H 1126 Budapest, XII. Beethoven u. 7—9.

HOTEL EXPRESS PANORÁMA

H 9730 Kőszeg, Szabó-hegy


INTERNACIAJ SOMERUMEJOJ:

sur bordo de lago Balatono: en Balatonföldvár, Kiliántelep en Danub-angulo: en Verőce

Detalajn informojn donas pri la individuaj kaj grupaj vojaĝoj, ebloj de refresigado



JUNULARA KAJ STUDENTA VOJAGKONTORO EXPRESS



H 1054 BUDAPEST,
V. Szabadság tér 16.

Telefono: 317-777

Letradreso: H 1395 Budapest,
62. Pf. 567.

Telex: 22-5384

Sciencfikcia situacio

En la ĉambro sidas kvar viroj mezaĝaj. Ili ĉiuj estas rondiĝantaj, iom kalviĝantaj, kun vizaĝo sukstreĉa kaj glata. Plaĉe ili etendiĝis en la foteloj, kelkfoje verŝas al si trinkaĵon, eĉ pala spuro de maltrankvilo ne vidiĝas sur ili; mallaŭte, preskaŭ indiferente ili babiladas. En la angulo sonas radioaparato; ili atentigas ĝin unuorele kaj kelkfoje ili plektas ian komenton post la aŭditaĵojn, ekzemple tiajn: „Nu, jen”, aŭ „Kiu do jam vidis tiaĵon?”, eble „Ĉi tio tamen jam estas tro...” Sed la programon okulvideble ili ĝuas kun ia ordinartaga, enua ŝateto; retrokliniĝinte en la fotelo, langvore sed supereme ili akceptas la informojn. Ankaŭ la voĉo de la parolisto esprimas nenian emocion:

„La Rapida Mondo” raportas: oni retrovis la ruinojn de la Boeing-aviadilo kraŝinta antaŭ unu monato. La flugmaŝino surhavis 130 vojaĝantojn, el ili mortis 128. La du transvivantoj, laŭ informoj ankoraŭ ne konfirmitaj, manĝis el la karno de la kadavroj konserviĝintaj en la frostoj. Unu el ili respondis jene la ĉi-koncernan demandon de la gazetreporteroj: „Ĉu vi prefere mortus de malsato?”

— Eĵ, ĉi tio estas ĝena — diris unu el la viroj.

„La okazlaboristo M. perdis sian monatan lukron per kartludo. Ĉar li volis daŭrigi la ludon, li vizitis konatinon: 80-jaran maljunulinon. En la malluma korto li sufokis ŝin per ŝnuro, poste per sia poŝtrankvilo tratranĉis ŝian gorĝon. La monon trovitan ĉe la aĝulino li prenis al si, reiris en la drinkejon kaj trankvile kartludis plu. Oni kondamnis lin je ĝismorta prizon-puno.”

— Ne iris al li bone la kartoj — diris la alia viro.

„Diskarnis knabeton du dogoj danaj en la Usona ŝtato Michigan. La murdemajn hundojn, Hanibalon kaj Kanibalon (kiel laŭstilaĵoj nomoj!) oni ekspedis en la urban hundkaptistejon.”

— Prefere drogo ol dogo — diris la tria viro.

„Aŭskultu de la populara bit-kantisto Roy Anton la numeron The old Death. Ĝi staras sur la dua loko de la furorkanta listo, senpere post la kanto de Rolingston-oj...”

La parolisto ĉi tie neatendite eksilentis. Krepitado, muĝado venis el la aparato, poste eksonis streĉita virvoĉo: „Karaj aŭskultantoj, ni interrompas nian dissendon. Ni petas vin, ke — rigarde al la eksterordinara situacio — ne elŝaltu vian aparaton...”

— Kio do, je l'diablo? — diris la unu viro.

— Kiu do vidis ion tian? — diris la alia.

Ĉiuj kvar, preskaŭ samritme, etendis la manon al sia glaso.

„Hodiaŭ vespere inter la 20-a kaj 21-a horoj, la teraj observo-stacioj rimarkis en la kosmo lumfenomenojn de nenatura origino. Post nelonge, en diversaj regionoj de Eŭropo, Azio kaj Ameriko, descendis fremd-originaj kosmoŝipoj, samtempe en la respektivaj areoj ĉesis la energiolivero. Laŭ la plej novaj informoj, la personaro de la kosmoŝipoj ne montras sintenon malamikan. Ni petas, ke vi ne elŝaltu viajn aparatojn. Ĝis plua sciigo ni dissendos muzikon.”

— Bona ŝerco — diras la unu viro.

— Infere bona ŝerco — diras la alia.

— Nur kie estas tia kreteno, kiu ĝin kredas?

— Per tiaĵo ne povas ŝerci radiostacio...

La muziko eksilentas. „Ni daŭrigas niajn informojn — ekkrakas ree la streĉita virvoĉo. — La respektivaj registaroj komencis intertrakton kun la alvenintoj. Laŭ unueca raporto de UPI, REUTER kaj AP, la venintoj estas senditoj de multe pli evoluinta civilizacio ol la tera. Iliaj teknikaj eblaĵoj estas senlimaj. Ilia vizito estas rezulto de longa preparado. Ili ne montras sintenon malamikan. La registaroj faris la necesajn aranĝojn. Krom la interŝanĝo de informoj — emfazas BBC — la fremduloj ne intencas aliformigi la teran civilizacion. Ilia viziton karakterizas la sinteno de pli aĝa kaj pli saĝa frato. En la koncernataj teritorioj ankoraŭ paŭzas la energiolivero. Ni ripetos nian komunikadon. Mi petas, ne elŝaltu vian aparaton kaj gardu vian trankvilon...”

— Nura sukero — diras la unu viro.

— Pli aĝa kaj pli saĝa frato — diris la alia. —

Kia azenaĵo!

— Ke ili enmiksas sin en nenion. En kion do ili devus sin enmiksi? Kaj, entute, kiu kredas?...

La elektrolampo subite komencas palpebrumi. Kun konsternita rigardo ili atentigas, kiel la lumo de la ardanta fadeno fariĝas ruĝa, poste blua kaj malrapide estingiĝas.

— Peston — diras la unu. — Kie estas la telefono?

La telefono estas surda.

— Kio do, kio?

„Mi petas, gardu vian trankvilon. La sinteno de la fremduloj ne estas minaca, la pritraktadoj daŭras plu.”

— Mankas elektro — diras la alia viro. — Kiel do la radio povas soni?

— Mi ne komprenas... — diras la loĝejmastro. Lia mano videble tremas.

Ankaŭ la muziko eksilentas. El la aparato venas kreptado de elektraj malŝarĝetoj...

— Nekredeble — ekparolas la unu viro. — Kio fariĝos el tio ĉi?

— Iliaj teknikaj eblaĵoj estas senlimaj — diras la alia viro. — Ĉu vi scias, kion ĉi tio signifas?

— Ĉiu scias, kion signifas la teknika supereco.

— Sklavecon — diras la tria. — El ĉi tio fariĝos ega krako. Teruro... Milito...

— Ĝi diras, ke ili estas boninklinaj — diras la loĝejmastro. — Kial kondukus la saĝa bonintenco en militon?

— Ankaŭ ni estas boninklinaj kontraŭ la hundoj. Ili masakros nin.

— Ankaŭ Pizarro estis bonintenca kontraŭ la inkaoj, ĉiu estas bonintenca kontraŭ la indiĝenoj. La ŝipkanonoj...

— Poste la raketoj... Ĉu vi do ne komprenas? Estos buĉado aŭ obeo. La ŝanĝo ĉiamaniere estas malbona, ni havas nenian bezonon je bonintenco veninta el la kosmo. Guste nun, kiam ĉio estas en ordo sur la tero. Nun, kiam estas paco.

La radio ree ekkraketis. „Nenia kaŭzo por angoro — ripetas la streĉita virvoĉo. — Gardu vian trankvilon. La komunikaĵoj admonas por atendo kaj konsiderado.”

— Ho, granda Dio, ĉi tio estas ja terura.

La tri sukstreĉaj, diketaj vizaĝoj interrigardas. En la okuloj vidiĝas hororo, plorpetego pri defendo, kaj larmoj de volo interaparteni.

Nun tra la megafono de la radioaparato eksonas la natura, joviala voĉo de la loĝejmastro: „Parade mi vin blagis, knaboj. Magnetofone mi surbendigis la tutan azenaĵon kaj elludis ĝin tra la radio. Ankaŭ la elektron kaj telefonon mi mem manipulis. La tuto estas demando de ŝaltado. Ĉu via kuraĝo sinkis en la piedpintojn? Ĉu eĉ la plej primitiva teknika truko taŭzas al vi la nervojn? Ĉu vi timas la bon-intencon? Kion vi havas timendan? La intelekto neniam estas minaca, ankaŭ vi mem ja estas intelektuloj, ĉu ne vere? Nun aŭskultu plu la veran programon. Mi enŝaltas la radion.”

Mallaŭta klaketo aŭdiĝas, poste revenas la trankvila voĉo de la parolisto: „La Rapida Mondo raportas: La Saigon-aj trupoj atakis la teritoriojn regatajn de la revolucia registaro. La inform-agantejoj sciigas pri impetaj bataloj. Kamboĝo estis grave bombata de aerfortresoj B-52...”

— Bone, bone, vi, mizerulo — diras la unu viro. — Fakte, vi nin dupigis.

— Kiu pensus, ke vi funkciigas vian cerbon pri tiaj stultaj farsaĵoj? — diras la alia. — Diablo vin prenu, mi havis eĉ frostotremon.

„Dudek sep personoj pereis en tiu incendio...”

— Nu, bone do, bone — diris la tria viro.

„Sud-amerikajn indianojn masakris...”

„... eksplodo... viktimoj frakasigintaj ĝis nere-konebleco...”

— Bone do, bone. Lerte vi faris la aferon.

La tri streĉitaj vizaĝoj loziĝas. Nur sur la fruntoj briletas ŝvito.

Tr.: K. K.

FRANZ JONAS

Lastmomente trafis nin la trista famo pri morto de la prezidento de Aŭstra Respubliko, *dr. h.c. Franz Jonas*.

Valoran homon perdis ne nur lia patrujo, sed ankaŭ tuta Eŭropo, por kies paco kaj sekureco li ĝismorte ne ĉesis batali. Lige al tio montriĝis lia sincera klopodo evoluigi la kontaktojn ankaŭ kun la socialismaj landoj. Okaze de lia oficiala vizito en Budapeŝto (1970), li esprimis sian opinion jene: „Guste la Danubvalaj landoj povas montri per harmonia agado, ke malgraŭ la ideologiaj dividlinioj, oni povas elformi sinceran kunlaboron en Eŭropa spirito”.

Duoble sentas la doloran perdon la larĝa mondo de la esperantistoj. La unua inter la ŝtatestroj li ne nur teorie simpatiis kun nia lingvo kaj movado, sed ankaŭ praktike montriĝis fidela adepto de nia humana afero.

La hungara esperantistaro estimplene omaĝas antaŭ lia memoro.

Hungara Esperanto-Asocio

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Ĉifoje la temo de nia ekzameno estos la „breviero” de nia originala poezio, la *Esperanta Antologio*, redaktita de Auld. Jen, la tri demandoj, el kiuj oni respondu minimume du por partopreni en la lotumado de premioj.

1. Kiu estis la verkinto de la subaj versoj:

„... Ili ja majstras lingvon, stilon, formon...
Jen la sekreto de ilia ĉarmo;
sed ili timas faktojn, strebon, ŝtormon,
timas rigardi en pupilon de la
moderna vivo, aktuala kruda,
kun ĉi mirindajaro superbela...”

2. En la supraj versoj troviĝas ne tro bonvola aludo pri certa verko de tre konata esperantista poeto kaj stilisto. Bonvolu alsendi la nomon kaj la titolon de la aludita verko.

3. Troviĝas en la antologio poemo de hungara esperantista poeto, kies lastaj versoj plende aludas al poemo de soveta esperantista poeto. Serĉu la du poemojn, kaj bv. alsendi la titolojn kune kun la nomo de la poetoj.

Limdato de la ensendo: la 1-a de aŭgusto.

Solvoj de la numero 1/74

1. Insulo de leporoj 2. Klostra pastro por fremduloj 3. 1268

Libropremion gajnis: Csaba Lendvay kaj Tore Johansson.

(Pro manko de spaco ni ne povas plu publikigi la nomon de ĉiuj personoj, alsendintaj ĝustan solvon.)



Ĉeĥoslovakio: Erzsébet Morvay, Svornosti 55, 94 001 Nové Zámky; Hilda Majercsik, Kupelna 3, 94 001 Nové Zámky (19-j. knabinoj dez. kor. pri serioza muziko, popoldancoj. literaturo).

Japanio: S-ro Watenabe Mituhisa, 381—22 Nagano-ken, Nagano-si, Sinonoi Komatubara 1299 (24-j. dez. kor. kun Orient-Europaj gejunuloj).

Pollando: Mariola Adamus, Str. Tatranska 87 M73, 93—279 Lodz, kaj Grazyňa Mrozik, Str. Tatrzańska 87 M84, 93—279 Lodz (16 kaj 17-j. dez. kor. kun t.m. pri ĉ.t.); Halina Piela, ul. Nowa Wies 27, 37—200 Pzeworsk (16-j. interes. pri filatelio, aŭtomobiloj, ĉevaloj); Andreo Poterek, ul. Koszarova 9A/410, 85—324 Bydgoszcz (24-j. studento de elektronika fako, interes. pri turismo, pentraĵo, orientalismo, kol. bk.); Mieczysław Porowski, 45—774 Opole, ul. Dambonia 133/15 (28-j. ekonomisto, dez. kor. kun t.m. pri turismo, sporto, muziko, interŝ. PM, bk. gramofondiskojn); Renata Budzyn, Str. Wolziczna 6, 93—334 Lodz (16-j. komencantino dez. kor. kun t.m. pri ĉ.t.); Elizbeta Lukaszczyk, Str. Przyborowski 17/5, 92—162 Lodz (17-j. komencantino dez. kor. kun t.m. pri ĉ.t.); Stanisław Mach, ul. Grunwałzka 88, D.S. 3, 60—307 Poznan 8 (20-j. studento interes. pri kemio, foto, religiaj problemoj, politiko).

Sovetunio: Tatjana Auderskaja, Str. Korolenko 5-B, 1.2b, Odessa—270 000 (21-j. studentino, interes. pri literaturo, arto, filozofio, vojaĝoj); Tamara Lejkifman, Primerovskaja 8, kv. 6, 310 008 Ĥarkov (19-j. studentino dez. kor. kun t.m., kol. bk. PM); Jelena Ŝestakova, ul. V. Gjuĝo 18^a, 310 032 Ĥarkov (21-j. studentino de matematika fako dez. kor. kun t.m., interŝ. bk. diskojn, insignojn, PM); Tatjana Tupikova, pr. Moskovskij 96a, loĝ. 50, 310 068 Ĥarkov (18-j. dez. interŝ. librojn, diskojn); Lisenko Vladimir Ivanoviĉ, obl. Zakarpatskaja, g. Uĝorod 294 000, ul. Sovetskaja 98 kv. 3. (22-j. studento dez. interŝ. PM laŭ temo: pentroarto, sporto, floro kaj faŭno); Esperantogrupo, Keskkool, 202 600 Polva, Estonio (mezlerneja E-grupo atendas leterojn el t.m.); Esperanto-rondeto, Mejłanka 8, ŝkola-internat N8, KID, 310 082 Ĥarkov—82 (Esperantistoj el speciala lernejo por infanoj kun postsekvaj de poliomiĵito kaj cerebrala paralizo proponas seriozan kaj daŭran interkorespondadon kaj interŝanĝon kun lernejoj el ĉ. landoj, precipe kun specialaj lernejoj por mal-sanaj infanoj).

El la programo:

la 21-an de junio, vendrede:

Solena inaŭguro de la Kongreso; Folklorprezentado kun dancoj, kantoj. Kongresa balo

la 22-an de junio, sabate:

Sekciaj kunsidoj (junulara laborkunsido, hungara sekcio de IPTEA, landaj fakkomisionoj, fo-ki-ma, ktp.) posttagmeze diversaj facilaj programeroj (ekskurso, strando, muzeo) Bivakfajro

la 23-an de junio, dimanĉe:

Kunsido de la hungara sekcio de MEM — Mondpaca Esperanto Movado
Solena fermo de la Kongreso

Oficiala Postkongreso

en urbo Szolnok, 24—26. 06. 1974.

Urborigardado, filmprezentado, tuttaga ekskurso provincon, bivakfajro, ktp. Partoprenkotizo kun kompleta pensio nur 200—300 Ft-oj! (Laŭ kategorioj!)

Adreso de la Kongreso: Organiza Komitato de la 25-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso, 5006 Szolnok, Poŝtkesto 11.

Peto al la eldonistoj

Kiel jam certe estis rimarkeble el niaj antaŭaj numeroj, *Hungara Vivo* klopodas fortigi sian partoprenon en la esperanta literatura vivo. Ni faris paŝojn ankaŭ por la internaciigo de nia kunlaborantaro, kaj forte esperas, ke ĉiam pli da esperantistoj abonos nian revuon, ja ĝi ne nur prezentas Hungarion, sed ankaŭ donas superrigardon pri la aktuala stato de nia kulturo.

Organika parto de la kultura vivo estas *la libroeldonado*. Bona literaturtendenca revuo estas malfacile imagebla sen vasthorizonta recenza rubriko, tial ni faros ĉion eblan por levi la nivelon de niaj recenzoj, kaj certe ni ankaŭ dediĉos indan spacon al ĉiu nova aperintaĵo. Ni petas ĉiujn eldonejojn helpi nin en la efektivigo de nia celo, kaj sendi al ni siajn eldonaĵojn por recenzo. Tio ankaŭ el komerca vidpunkto estos profitiga entrepreno por ili, ja sole la libroservo de HEA disvendas jare librojn en valoro de ĉ. 100.000 forintoj (4.000 dolaroj) — kaj el tiu kvanto ĉ. la kvarono estas mendita de la libroservo de UEA kaj okcidentlandaj eldonejoj.

Ni esperas, ke tiu ĉi peto ne restos seneĥa, kaj baldaŭ nia recenza rubriko povos respreguli sen mankoj la libroeldonan aktivadon de Esperantujo.

La Redakcio

Sur la spuroj de genia esploristo

Rimarkindan, eĉ admirindan entreprenon plenumis *Ödön Jakabos*, hungara fervoj-oficisto el la Transilvania parto de Rumanio: li trairis la vojon pasitan de la hungara esploristo *Sándor Kőrösi Csoma*.

S. Kőrösi Csoma, pri kiu H. V. jam raportis (1965, I.), naskiĝis antaŭ 190 jaroj. Malriĉa, por studi en kolegio, li subtenis sin kiel servanto de aliaj studentoj, kutimiĝante tiamaniere al memdisciplino. Lia granda revo estis trovi en Azio la prapatrujon de la hungaroj. Sciiĝinte, ke en Aziaj bibliotekoj troviĝas priskriboj pri hungaroj, li fervore sin preparis por ties esploro: li ellernis 17 lingvojn. En 1819 li ekiris piede al oriento, pasis tra Egipto, Bagdad, Teheran al Hindujo. En Leh, ĉefurbo de Panĝab, angla scienculo atentigis lin pri la neceso lerni la tibetan lingvon. Li retiriĝis en lamaan monakejon situantan 4000 metrojn alte kaj en malvasta ĉelo li lernis kaj faris siajn notojn inter la plej mizeraj cirkonstancoj. Tiel li pretigis la unuan tibetan-anglan vortaron el 40 000 vortoj. La angla registaro donis al li por tio 500 rupiojn; ties duonon li donis al la lamao lin helpinta.

En lia patrio, sciiĝinte pri lia grava scienca laboro, oni kolektis por li monon, sed tiun li resendis al Budapeŝto por fondumo de stipendioj. En 1842 li povis fine eniri Tibeton, sed tie lin atakis malario kaj malsane reveninte al Darĵiling, tie li mortis samjare. La 58-jaran, tiam jam mondfaman hungaran scienculon oni enterigis tie, ĉe la piedo de la plej alta monto de l'mondo. Lia vortarego lin rangas inter la plej grandaj lingvistoj. Kaj alia hungara esploristo *Baktay* surprizite konstatis, ke la kristanoj en Leh ĝis nun kantas psalmojn en la tibetlingva traduko de Kőrösi Csoma.

Liajn spurojn sekvis nun, post preskaŭ 150 jaroj alia sikulo *Ö. Jakabos*. Ankaŭ li preparis sin zorge per lernado de lingvoj, per korpa trejnado (biciklado tra 8000 km. en Ĉeĥoslovakio, tra 15 000 km. en Okcidenta Eŭropo). En sia dorsosako li kunportis manplenon da tero el la ĝardeno de la naskiĝdomo de Csoma kaj li iris, komence fervoje, poste per aŭto-stopoj, piede, sur ŝarĝaŭtomobiloj, ĝis Bagdad kaj Kuvait. Ĉi tie de rumanaĵ samlandanoj li ricevis monon por ŝipveturo ĝis Bombay. Poste zigzage li travagis Hindunion, kaj post kvar monatoj (februaro de 1973) atingis Darĵilingon. Tranoktinte en kelo, fine li vizitis la tombon de Csoma, sur kiu staras simpla marmortabulo kun epitafio, tekstanta interalie: „Li serĉis la lulilon de la hungararo kaj fine, falinte pro siaj penadoj, ĉi tie li

sonĝas sian eternan dormon, malproksime de sia patrujo, sed vivante en la animo de ĉiu bona hungaro”.

Jakabos ŝutis la hejman teron sur la tombon.

Revenante, li vizitis la Azian Societon kaj tie trovis multajn presitajn memoraĵojn pri Csoma kaj ankaŭ liajn artikolojn en gazetoj, el kiuj li hejmenportis kopiojn de 150 paĝoj. Post multaj aventuroj, li sekvis la vojon, kiun iam iris Csoma, tra Afganistano, Irano, Turkio. Hejme li piediris al la juglandarbo en Csomakörös kaj miksis tie en la grundon de la teron, kiun interŝanĝe li alportis el la tomo de Csoma. Nun li pretigas siajn notojn, esperante, ke lia naŭmonata pilgrimado plivastigos niajn konojn pri tiu modesta hungara scienculo, S. Kőrösi Csoma, kies ekzemplo, kiel videble, eĉ nun povas entuziasmigi por tiaj entreprenoj.

P. Balkányi

Eszperantó Magazin aperas monate

Kun ĝojo ni informas nian legantaron, ke la revuo *Eszperantó Magazin*, pri kies debuto ni raportis en la ĉijara unua numero de Hungara Vivo, ekde januaro fariĝis monata revuo, kvankam kun iom reduktita amplekso: anstataŭ 32 nun ĝi aperas sur 24 samformataj paĝoj kiel Hungara Vivo.

Aperante ĉiumonate, *Eszperantó Magazin* povas servi pli efike la popularigon de la Internacia Lingvo en Hungario. Daŭre kunlaboras en ĝi elstaraj personoj de la hungara kultura vivo, kaj estus superflue emfazi, kiom multe tiu fakto altigas la prestiĝon de Esperanto en Hungarlando.

La revuo havas inter siaj celoj ankaŭ la popularigon de la esperanta literaturo kaj kulturo: ĝis nun aperis jam en hungara traduko verkoj de Auld, De Kock, Ken Miner, Waringhien, Vatré kaj aliaj.

Ni pensas, ke la revuo, kiu ankaŭ teknike estas bonkvalita, havas intereson ne nur por la hungaraj esperantistoj, ja ĝi bone utiligeblas ankaŭ kiel ekspozicia materialo. Krome, ĉiu numero enhavas tri kvar paĝojn en Esperanto, kiuj raportas pri la eventoj de la hungara kaj internacia Esperanto-movado.

Landaj asocioj, lokaj grupoj kaj ĉiuj esperantistoj, kiuj laboras por disvastigi la Internacian Lingvon, certe povus ĝin bone uzi en sia agado. La sumo de jarabono estas vere malalta: por 12 regule aperantaj numeroj entute 3 usonaj dolaroj! Oni abonu ĝin ĉe la eksterlandaj reprezentantoj de la firmo *Kultura* aŭ rekte sendante ĉekon de 3 dolaroj aŭ egalvaloro al la Centra Oficejo de Hungara Esperanta—Asocio (H—1368 Budapest, Pk. 193. Hungario)

V. Benczik

Afrikaj kaj Aziaj junuloj en la Hungara Sporta Altlernejo

La Hungara Sporta Altlernejo (HSA) estis populara jam en la 1930-aj jaroj ne nur hejme, sed ankaŭ trans la landlimoj, en la internaciaj sportaj medioj. En tiu „citadelo de la sporto”, pluraj fremdlandaj studentoj lernas ankaŭ nun; tri el ili reprezentas la subevoluintajn landojn.

Por la dua diplomo

Por *Bousslama Sayadi Mounir* nek Budapeŝto, nek HSA estas io eksterordinara.

— El Tunizo, la ĉefurbo de Tunizio mi venis ĉi tien, jam kun diplomo de sportinstruisto. Hejme mi konatiĝis kun Árpád Németh, la hungara skermotrejnisto; al li mi ŝuldas unuavice, ke mi fariĝis elektita sabristo, kaj ke kun granda scivolo kaj lernivolo mi venis al Budapeŝto por la dua diplomo. Mi estas stipendiulo, en la somera ferio mi povas viziti mian hejmon nur, se mi bone ekzameniĝis. Bonŝance ĝis nun ĉio iris bone, pasintjare mi fariĝis rangunua inter la anoj de mia lernojaro!

Bona amiko de Wolde

La etiopiano *Getachew Alemayehu* venis el la urbo Dire Dawa. Ankaŭ li estas „progresanto”, ja en sia lando — en elementa lernejo — li jam instruis. Li korbopilkas kaj flugpilkas, samtempe li ŝatas ankaŭ la atletikon. Hejme lia amiko estas *Mamo Wolde*, la mondĉampiono de maratona kuro de la Meksikurba olimpiko.

— Je la konsilo de mia bona amiko Mengistu mi venis ĉi tien por lerni. Ankaŭ li akiris sian diplomon ĉi tie, kaj nun estas li, kiu trejnas Yfter-on, unu el la plej talentaj longdistanc-kuristoj de Afriko. De du jaroj mi estas en Budapeŝto; dume mi bone lernis la hungaran lingvon. Mia sola malĝojo estas, ke dum miaj studoj mi ne povas viziti mian hejmon, pro la

grandaj vojaĝkostoj. Mia patro estas lokomotivisto, mia patrino okupigas hejme — kune kun miaj ok gefratoj. El la sporteventoj min pleje interesis la ĉampionado de manpilkado, tiom pli, ĉar tiun sportobranĉon oni apenaŭ konas en Etiopio. Hejmenveninte, kun miaj junaj kolegoj per ĉiuj fortoj ni strebos fondi sportan altlernejon.

Pleje malfacilas la lingvo

La vjetnama *Nguyen Tien Phuc* estas la plej juna.

— Kun eminenta rezulto mi trapasis ekzamenon similan al la hungara abiturienta ekzameno kaj poste kun tridek miaj kunuloj mi faris pli novan akceptekzamenon por fariĝi la studento de la Hungara Sporta Altlernejo. Mi estas tre fiera, ke mi sukcesis veni al Budapeŝto. Min trafis neatendite la malfacileco de la hungara lingvo. Apenaŭ mi povas kutimiĝi al tio, ke unu vorto, konsistanta el kvar silaboj en la hungara, estas esprimata en la vjetnama per tri apartaj vortoj. Estas bonŝance, ke niaj instruistoj, se necese, eĉ trifoje klarigas ĉion. Mia favorata sportobranĉo estas la gimnastiko, sendepende de mia lernoklaso mi vizitas preskaŭ ĉiun Budapeŝtan tian konkurson. Miaj plej malfacilaj ekzamenoj estos tiu el la hungara lingvo kaj la raporto el la lernobjekto pri la historio de la Hungara Popolrespubliko. En HSA ni jam sketis kaj skiis — hejme mi nur aŭdis pri tiuj sportobranĉoj.

Ĉiuj tri estas duajaraj studentoj de la instruist-eduka fakultato, laŭ la opinio de la profesoroj, entuziasmaj kaj diligentaj lernantoj.

(Transprenite el la ĵurnalo)
NÉPSZABADSÁG.

Tradukis: Tibor UJLAKI-NAGY



Desegnaĵo de Pál Barczy

KORESPONDI DEZIRAS

Hungario: Eszter Nagy, 7633 Pécs, Lotz Károly u. 19. (18-j. lernantino dez. kor. kun t.m.); Pedagoga Esperanto Grupo, 5000 Szolnok, Délibáb út 14.) serĉas kontakton kun eksterlandaj pedagogoj, ĉu grupe ĉu individue, interes. pri edukado, precipe pri E-instruado); Stata Instituto por Edukado, 1021 Budapest, Vöröshadse-reg u. 165. (dek lernantoj (10–14-j.) dez. kor. kun t.m., interes. PM, bk, alumetetikadojn, presitajn florojn, insignojn).

PRI ESPERANTO-POEZIO

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15
16			17				18		19			20		
21							B	22						
23						24			25					
26					27	28		29	30					
31				32				33		34	35			
36	37		38							39	40	41		
42		43					44	45				46		
47						48			49	50				
51						52			53					
54				55		56		57			58			
59			60			61			62		63	64		
65		66		67	68				69		70	71		
72	73				74	75			76				77	
78														

Pluraj vicoj de nia enigmo koncernas la titolo menciitan temon. Ensendi sufiĉas nur la solvojn de tiuj vicoj formantaj la skeleton de la figuro. Limdato de la ensendo: la 1-a de aŭg. Inter la solvintoj ni lotumos libropremiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. Tiu ĉi poemaro de PETER PENETER (aperis en 1932.) havas la subtitolon: „Al gefianĉoj kaj junaj geedzoj por instruo kaj instigo”. 16. Frakcia. 17. Multe diskutita finaĵo. 18. Post la unua sekvas. 19. Duondenaro! 20. Bradipo (Radiko). 21. Romo dio de la maro, responda al la helena Pozidono. 22. Privilegio por fabriki aŭ vendi ian komercaĵon (R). 23. Transpagilo por sumo el sia konto en la konton de iu alia. 24. BIA. 25. Rilata al la plej interna membrano de la okulo, sur kiu formiĝas la bildoj. 26. Donos bonan ekzemplon al iu, inspiros virtajn sentojn. 28. Samspecaj literoj de BELULO. 30. Koscion de veraj meritoj kaj virtoj de iu.. 31. Tuto da homoj kunvivantaj pro komunaj interesoj (R). 32. Samspecaj literoj de CEJANO. 33. Larĝa urba strato, kun du vicoj da arboj (R). 35. Saltanta besteto, kiu kvakas. 36. Urbo kaj rivero en Sovetunio en Urala-regiono. 38. Membro de la gvidantaro. 40. Adverbo. 42. Poetino, aŭtoro de poemaroj: „Kontralte”, „Cent ĝojkantoj” kaj „Eroj”. 45. Ekde la apero de tiu ĉi poemaro oni parolas pri „Skota skolo”. 47. Tiel aranĝita, ke ĝi estas disponebla por tuja uzo. 48. Quanta perfektan feliĉon. 50. Taŭga, pripensita procedaro (R). 51. La rusto estas ankaŭ tio. 52. Unuo de elektra rezistanco. 53. Interefike, koncerne. 54. Unuo de longo (R). 55. Plurjara ligneca planto (R). 57. Kapabla juĝi la aferojn tiaj, kiaj ili estas, kaj laŭ tio ĝuste konduti (R). 58. La organo de aŭdkapablo (R). 59. Ekstera montrilo de ies forto aŭ kapablo. 60. Kemiaj simboloj de sulfuro kaj silicio. 61. Persona nedefinita pronomo. 62. Interjekcio. 64. Kemiaj simboloj de ionio kaj vanado. 65. Duono de robo! 66. Nedefinitan econ. 68. Urbo en Finnlando. 69. Plenda ekkrilo. 71. ZI. 72. Rubando servanta por subteni ekz. glavon. 75. Miksita teo! 76. Urbo en Sovetunio (ne E-igita formo). 78. „El...”: poemaro de KENJI OSSAKA, originale verkita kaj tradukita poemoj.

VERTIKALAJ VICOJ: 1. Triakta lirika komedio de JULIO BAGHY. 2. Ido de Eneo, fondinto de la roma gento. 3. Subita, senmotiva. 4. Konfirmi internacian traktaton aŭ konvencion. 5. Malgrandulo. 6. Transformo de feloj en ledon per tanacido. 7. Ne bakita, susekigita briko (R). 8. „...eposo”: poemaro de RETO ROSSETTI, verskroniko de Esperanto ĝis la Bulonja Kongreso. 9. Estanta nedistingebla pro ĉiuj ecoj similaj al tiuj de io alia. 10. Per flaro oni povas ĝin konstati (R). 11. Ne malaserti. 12. Plurjara herbo kun helkoloraj floroj, havantaj kvarfolian kalikon kiuj malfermiĝas precipe nokte (R). 13. Karakterizaj, koncernaj mamuloj el la subordo de neparhufuloj vivantaj en Suda-Azio kaj Sud-Ameriko. 14. Parton de tuto, kiun oni tranĉas al ok samgrandaj partoj. 15. Filozofi-lirikaj fragmentoj, originale vertikaj de E. IZGUR. 27. Stato de plene kvietigita manĝobezono. 28. Plej granda insulo de Indonezio. 29. L' nordpoluso. 30. Koloro (R). 32. Vivadas. 34. Ekami iun. 37. Granda manĝilo. 38. Eligo ekz. de korko (R). 39. La organo de aŭdkapablo. 41. Diigo, glorigo per eksterordinaraj kaj entuziasmaj laŭdoj (R). 43. Okcidento (neol.). 44. La unua poeto de Esperanto. 46. Fokospeco, vivanta ĉe suda Sud-Ameriko (R). 48. Truigilo (R). 49. Granda duoninsulo, troviĝanta inter Ruĝa Maro, la Hinda Oceano kaj la Persa Golfo (R). 56. Rilata al akvoveturilo pelata per remiloj. 57. Ujo por ĉerpi akvon el putro (R). 60. En stato de plene kvietigita manĝobezono. 63. Ano de nacio vivanta en Jugoslavio (R). 66. Persona pronomo. 67. Prefikso por formi neajn tabelvortojn. 69. Objekto, fabrikita por vendado (R). 70. Okan fojon. 73. Sufikso esprimanta kolekton. 74. Komenco de la vertikala 46. 76. HO. 77. Lirika poemo (R).

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 74/1 estas:

BULTHUIS — ENGHOLM — ADAMSON — SAĤAROV
BELMONT, MIYAMOTO — SUR SANGA — ŠIRJAEV

Libropremiojn gajnis: N. A. Joĥanoviĉ, 683006, Petropavlovskna—Kamĉatke, Bulvar Ribackoj Slavi, Nro 3, kvartira 10; Linde Knöschke, 1071 Berlin, Malmöer Str. 26, DDR; Varga Sándor, 2300 Ráckeve, Kossuth u. 78. Hungario.

Kiu estis la sennoma verkisto

de la unua hungara historio?

Rimarko al la artikolo Vintra Vojaĝo en No 2. de HV 1974.

Prof. L. Kökény en sia interesa vojaĝpriskribo mencias la daŭran agadon por malkovri la homon, kiu verkis la unuan libron pri la historio de la hungaroj. Konate la kovrila paĝo de la valorega manskribita libro estas perdita. Sed ĝuste profesoro de la Abatejo Pannonhalma laŭ plej novaj sciigoj malkovris la sekretan post multjara, diligenta kaj persista klopodo ekzamenante la paĝojn de la verko, kaj aliajn dokumentojn en diversaj bibliotekoj kaj arĥivoj. Li fine malkovris, ke en la komenca inicialo, laŭ kutimo de la kodeksoj pentrita granda litero majusklo P enhavas signojn, eĉ literojn, kiujn — post kopiado, fotografada ekzameno — oni povis diveni. Ili klarigas la nomon PÓSA. Tiutempe oni malkaŝis tiel la nomojn de verkistoj, skribistoj en la inicialojn. La scienculo poste trovis, ke kun tiu nomo ekzistis en la tempo de reĝo Béla episkopo, kiu vivis en Hungarujo kaj poste en Bosnio.

P. B.

HUMURO

Subluo. — Virinan vizitanton vi ne rajtos akcepti!

— Kaj viran?
— Tiam jes.
— Tiam mi luos la ĉambron por mia fianĉino.

Obstaklo. Franca turistoj rakontas en *Paris Match*.

Mi estis en Italio kaj jam suferis je fobio de trinkmono (al pordisto, lift-knabo, kelnero, ĉambristino ktp.). Foje oni frapetas sur la pordo de mia hotel-ĉambro.

— Kiu estas?
— Mesaĝknabo. Depeŝo al vi venis. Triumsente mi ridetis kaj diris tra la fermita pordo:
— Domaĝe, mi estas en negliĝo. Mi petas, englitigu ĝin sub la pordo. Post momenta silento:
— Maleble, sinjoro.
— Kial do maleble?
— Ĝi estas sur pleto.

Observemo. Vica, ĉarma knabine-to, tamen havas la miskutimon fari pri ĉiu rimarkon. La patrino multfoje ŝin admonas:

— Filinjo, tio ne decas. Se vi vidas ion, notu en via kapo kaj hejme ni preparolos la aferon.

Last-okaze ili veturis sur tramo kaj vidalvide al ili sidis aĝulino kun ekstreme longa nazo. La patrino tuj flaris danĝeron kaj klopodis deflan-kigi la atenton de la filineto.

— Vidu, Vicnjo, kiel kuras la arboj!
La infano tamen nur plu gapis al la nazo de la virino kaj fine diris laŭte:
— Panjo, la nazon de ĉi tiu onjo ni preparolos hejme.

Lingvoscio. Du viroj promenas sur Budapeŝta strato, Apud ili haltas eksterlanda aŭto.

— Sprechen Sie deutsch? — demandas la aŭtulo.

La demanditoj skuas la kapon.
— Do you speak english?
Silento.

— Parlez vous français?
Silento. La eksterlandano gestas kaj veturas plue.

— Oni devus lerni lingvon — suspiras unu el la viroj.

— Por kio? — respondas la alia. — vidu, ĉi tiu parolas tri lingvojn kaj tamen ne prosperis.

Akcidento. — Sinjoro doktoro, ligin-splito pikiĝis en mian langon.

— Kiel tio povis okazi?
— Botelo da viskio elfluis sur la plankon.

Motivo. Viro alpaŝas policancn.
— Sinjoro komisaro, urĝe min arestu kaj konduku en arestejon. Per forna skrapilo mi batis mian edzinon je la kapo.

— Nu, kaj ĉu eble ŝi mortis?
— Tute ne. Ĝuste tial mi vin petas, ke vi min tuj enfermu.

Amikinoj. Du amikinoj sidas en kafejo.

— Kaj diru, Vilma, ĉu vi kredas, ke tiu skandalo certe okazis al Erika?
— Kompreneble, ke mi kredas. Pri kia skandalo temas?

Distingeco. Tre distingita angla lordo, post ŝiprompo, ĵetiĝas sur insulon neeloĝatan. Oni retrovas lin tie nur post dek jaroj. Liaj savantoj mire vidas, ke la lordo dume konstruis por si tri domojn.

— Por kio do vi bezonis tri domojn? — iu demandis.

— En la unua domo mi loĝas — li respondis —; la dua domo estas la klubo, kiun mi vizitadas.

— Sed por kio la tria?
— Ĝi estas tiu klubo, kiun mi ne vizitadas.

En spicvendejo. Du aĉetantoj interparolas pri la kosmoveturo. La unu diras:

— Sur la luno, ekzemple, unu kilogramo estas nur deksep dekagramoj.

La vendistino kunfrapas la manojn:

— Kaj ĉu neniu reklamacias?

Proverbismo. — Sinjoro doktoro, ĉu vi venos ankaŭ morgaŭ?

— Jes, certe. Tiom pli ke ĉistrate mi havas ankaŭ alian pacienton kaj tiamaniere mi povas mortbati du muŝojn per unu frapo.



Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapeŝt, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XIV. jaro. 1974. 3-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoroj:

D-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai,
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada
Császár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy,
d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan,
Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó,
d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy,
Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi,
Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko
Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato ĉiun merkredon kaj la unuan kaj trian ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la dua ĝis la kvina horo havas akceptotagon.

Redakcio: Budapeŝt, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefona: 141—078

Eldonas: „Népszava” Gazeteldona
Entrepeno, Budapeŝt, VII., Rákóczi
út 54.
Telefona: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor
direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 1900. Budapeŝt. V. József nádor tér 1) senpere, aŭ per poŝtmandato.


La abono estas por jaro (ses numeroj)
Ft. 48.—, al eksterlando krome
Ft 9.60 por afranko.

74. 3282 Dürer Nyomda, Gyula

Indexszám: 25.377



Konsumturist



Valoran artobjekton
porcelanon de bona marko
stilmeblon

Varojn acetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane eksporti el la lando


Vi povas acetati el granda sortimento kontraŭ valuto
internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto
I. Hess András tér 3


Hotel Intercontinental–Hotel Gellért
VI. Népköztársaság utja 27.



*Hidrometeorologia stacio en urbo
Fertőrákos*



*Mineralakva strando
en urbeto Leányfalu*



Surakva pumpinstalajo en la rivero Tisza